

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŔSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—; fremdlando Kĉ 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pollando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271

Uzu la almetitan aliĝilon kaj paĝilon kaj aliĝu ankoraŭ hodiaŭ al la IV. Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso en Teplice-Sanov. Pri la kongresurbo informas vin artikolo en tiu ĉi nro.

Aliĝante antaŭ la 10. Majo vi pagas sole 16 Kĉ-kotizon, poste vi pagus 20 Kĉ. Ankaŭ konvenan ĉambron vi povas elekti aliĝante frue.

La kongreso okazas dum Pentekosto, la 26.—28. Majo. Partoprenos ĝin ankaŭ S-ro Hans Jakob, direktoro de UEA.

Granda parto de tiu ĉi n-ro enhavas raportojn kaj informojn el ĈAE. Legu ilin kaj vidante la nombron 382 membroj, ne hezitu aliĝi almenaŭ en 1928.

S-ro Eiselt direktoro, prez. de ĈAE, kiu atingis sian 70an jaron estis elektita en la jarkunveno honora membro de ĈAE.

Tempolimo por konkurso de La Progreso finiĝas 31. Majo. Jam alvenis laboroj. Partoprenu ankaŭ! (Vidu p. 28.)

Ĉu vi scias, ke en 1927 aperis pri esperanto 1223 informoj ĉefaj aŭ slovajakaj en 168 gazetoj? Helpu en via loko kaj la nombro ankoraŭ kreskos en 1928. (Vidu p. 44.)

Atentu la alineon pri ekspozicia materialo sur paĝo 48.!

Legu la Dek Demandojn, tria serio, kaj respondu ilin, antaŭ la 15. Majo.

Kaj —
ne forĝesu reaboni, se
vi ne ankoraŭ sendis la abonon.

TEPLICE-SANOV FESTURBO DE LA IV. ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KONGRESO, PENTEKOSTE 1928.

Dum mi skribas miajn liniojn, viglaj manoj jam prepariĝas al la komenco de la kuracsezono en mia kara hejmurbo, ĝardenistoj grimpas jam en la branĉojn de multjaraj arboj kaj tranĉas per grandaj tondiloj ĉion, kio kontraŭstaras al la kreskado de la novaj, junaj branĉoj. La vigla kuracdirektoro S-ro Kolarz jam preparas ĉion en la mondfama „ŝtonbano“, samtempe ankaŭ ĉiuj posedantoj de kuracdomoj; ankoraŭ unu aŭ du monatoj kaj jam alvenos la unuaj bangastaj hirundoj. Do estas necese prepari ĉion por prezenti al la ĝegastoj tion, kion trovi ili kutimiĝis: pureco, komforteco kaj — koreco.

Ankaŭ por vi, karaj gesamideanoj ĉeĥoslovakaj, la LKK de la fest kaj banurbo senlace laboras por havigi al vi verajn neforgeseblajn pentekostajn tagojn.

Ĉiu, kiu jam venis al Teplice-Sanov kiel gasto, estis ravita de beleco de tiu urbo, lokita meze en plena verdaĵo 230 m super la marnivelo, ĉe suda deklivo de la arbarriĉa „Minmontaro“ kaj sude limigata de la nordaj deklivoj de la „Bohemia Mezmontaro“: la Kastelmonto (kun ruino), la Stefano-altaĵo, la Reĝo-altaĵo, kiuj lastaj tri jam apartenas al la kuracdistrikto. Al la nomitaj altaĵoj aliĝas larĝa, preskaŭ 5

km longa parkzono, kiu estas plilarĝigata kaj entenas la sanigejojn. Al la kuracdistrikto aliĝas norde kaj nordokcidente aliaj partoj de la banurbo. Teplice-Sanov ne nur estas serioza sanigbanurbo, sed ankaŭ unu el la plej gravaj

poj donacas al la urbo la ĉarmon, kiu mankas al multaj aliaj urboj. Jen en la mallarĝaj stratoj, kiuj gvidas apud la kastelo, troviĝas profunde sub la fundamentaj rokoj de la urba preĝejo la sanigaj termoj kun la varmega „pra-



Stona bano

kulturcentroj de la nordokcidenta Bohemio. La klimato estas milda, la meza jartemperaturo estas 10^o C. Multe konataj estas ĝiaj belaj konstruaĵoj kaj la ĝojiga gastameco de la loĝantaro, vere, ĝi estas urbo, kia rapide fariĝas gastoloko por ĉiu fremdulo. Sed ne nur: la

fonto", kiuj venas el porfira fendego, kaj subtere traigas la tutan urban teritorion. La Teplic'aj sanigfontoj havas alkal-salinan karakteron kaj distingiĝas per alta temperaturo (ĝis 46^o C), per granda produktemo (la „prafonto" ĉiutage elĵetas preskaŭ 25.000 litrojn da akvo) kaj



Sinjora bano

eksteraj ĉarmoj kaj la mondfameco kiel banurbo elĉerpas la mirindan econ de tiu terangulo. Kiu volas interkonatiĝi kun la urbo mem, devas ĉi tie resti iomete pli longe kaj kaŝe aŭskulti tie, kie la historio rakontas el la evoluado de du jarcentoj. Nome la feliĉa intermikso de la novepoka vivo kun la restoj el antikvaj tem-

per alta radioaktiveco (ĝis 92 Macheunuoj); ili estas do la plej radioaktivaj fontoj en Ĉeĥoslovakio. En ĝiaj akvoj jam banis Keltoj kaj Romanoj per resanigi vundojn ricevitajn dum la bataloj, kaj ĝiaj akvoj ankoraŭ hodiaŭ mildigas suferojn por centmiloj da malsanuloj. La mezepokaj batalplenaj tempoj postflasis

km longa parkzono, kiu estas plilarĝigata kaj entenas la sanigejojn. Al la kuracdistrikto aliĝas norde kaj nordokcidente aliaj partoj de la banurbo. Teplice-Šanov ne nur estas serioza sanigbanurbo, sed ankaŭ unu el la plej gravaj

poj donacas al la urbo la ĉarmon, kiu mankas al multaj aliaj urboj. Jen en la mallarĝaj stratoj, kiuj ĝvidas apud la kastelo, troviĝas profunde sub la fundamentaj rokoj de la urba preĝejo la sanigaj termoj kun la varmega „pra-



Ŝtona bano

kulturcentroj de la nordokcidenta Bohemio. La klimato estas milda, la meza jartemperaturo estas 10⁰ C. Multe konataj estas ĝiaj belaj konstruaĵoj kaj la ĝojiga gastameco de la loĝantaro, vere, ĝi estas urbo, kia rapide fariĝas gastoloko por ĉiu fremdulo. Sed ne nur la

fonto", kiuj venas el porfira fendego, kaj subtere traigas la tutan urban teritorion. La Teplic'aj sanigfontoj havas alkal-salinan karakteron kaj distingiĝas per alta temperaturo (ĝis 46⁰ C), per granda produktemo (la „prafonto“ ĉiutage elĵetas preskaŭ 25.000 litrojn da akvo) kaj



Sinjora bano

eksteraj ĉarmoj kaj la mondfameco kiel banurbo elĉerpas la mirindan econ de tiu terangulo. Kiu volas interkonatiĝi kun la urbo mem, devas ĉi tie resti iomete pli longe kaj kaŝe aŭskulti tie, kie la historio rakontas el la evoluado de du jarcentoj. Nome la feliĉa intermikso de la novepoka vivo kun la restoj el antikvaj tem-

per alta radioaktiveco (ĝis 92 Macheunuoj); ili estas do la plej radioaktivaj fontoj en Ĉeĥoslovakio. En ĝiaj akvoj jam banis Keltoj kaj Romanoj per resanigi vundojn ricevitaĵajn dum la bataloj, kaj ĝiaj akvoj ankoraŭ hodiaŭ mildigas suferojn por centmiloj da malsanuloj.

La mezepokaj batalplenaj tempoj postflasis

multajn signojn en la urbo; kruelaj estis la tempoj de la religiaj bataladoj, sed la persistema diligenteco de la loĝantaro denove konstruis, kion detruis malbonaj tempoj kaj la saniganta favoro de la fontoj kunhelpis fari el la urbo centron de la norbohemia limteritorio.

En la ĉirkaŭiĝo kreskas riĉaj industrioj, nome la vitro-industrio, multnombraj minejoj elfosas la karbotrezorojn, kotonŝpinejoj forsendas siajn produktaĵojn en la tutan mondon, same kiel la porcelanindustrio — kaj la tuta urbo mem elkreskis kiel fortocentro de tiu senripoze aĝema laboro. Krom la malnovaj banejoj (urba, princa, serpenta kaj nova banejoj ktp.) estiĝis novaj banejoj kun pompaj arkitekturoj, kiuj respondas al ĉiuj postuloj de komforteco kaj kiuj estas organizataj laŭ la plej modernaj spertoj, nome la „urba kuracdomo“ en kuracĝardeno, la „ŝtonbanejo“ ktp. La „militistara banejo“ plenumas sian destinton montritan en la titolo.

Sekve de la ĉiam progresanta evoluo de kuraĉa vivo elkreskis nature ankaŭ la spirita vivo de la urbo kaj fondis multajn lernejojn de ĉiuj kategorioj: popolaj kaj burĝaj, komerca akademio, liceo, gimnazio, reallernejo, elektroteknika kaj multaj fakaj. Vidindaj estas la publika biblioteko kun la legosalonoj kaj la muzeo. La urba orkestro el lertaj muzikistoj jam superis multfoje kelkajn grandurbajn orkestrojn. Seume, Beethoven, Goethe, Richard Wagner estis gastoj de tiu ĉi naskiĝurbo de polusa esploristo Payer. En ombro de malgranda kapelo estas la tombo de J. G. Seume; malmultajn paŝojn apude staras la monumento de tiu senripoza „migranto al Syrakus“.

Antaŭ kvar jaroj malfermiĝis la pordoj de la „nova urba teatro“. La monumenta konstruaĵo leviĝas sur la loko, kie staris la malnova teatro, en la jaro 1919 de kruelaj flamoj forrabita, kaj ĝi estas la plej moderna teatro sur la kontinento. Aldonata estu nur, ke la Teplic' aj scenejoj pro siaj grandeco kaj teknikaj helpiloj estas destinataj gvidi la spiritan vivon de la nordbohema popolo en Ĉeĥoslovakio.

Ĉiam estas la stranga miksaĵo, kia — kiel jam komence dirite — donas al la urbo strangan karakteron: moderna altcela, multfoje iomete nerveca rapidemo, granda vivo en la kadro de tiel historiariĉa estinteco, sed simple aperanta urbo de 30.000 enloĝantoj. Ni vidas troni la novan Mozart-monumenton kreitan de Metzner antaŭ la tempgriza konstruaĵo de malnova juĝejo, kiu jam vidis juĝojn okazintajn sub la ĉielo.

Neniu fremdulo forĝesu viziti ankaŭ la Kastel-

monton, kronitan de malnova kastelo, kiu ebligas belegan rondvidaĵon al la fruktodona valo de Bělá. Ĝis kie la multnombraj vilaĝoj donas lokon, etendiĝas fruktodonaj herbejoj kaj kampoj. Meze, inter la kampoj, sporade kiel insuloj, malgrandaj arbaretoj memorigas pri la tempoj, kiam tie etendiĝis fortoplena praarbaro de grandegaj kverkoj, kiun ekkulturis homa forteco, sekiginte tie marĉojn en rezistema batalado kaj fondinte bienetojn. Tiamaniere fruktodonaj terpartoj ĉiam pli kaj pli etendiĝis en la arbaron, kreskis — kaj hodiaŭ kuŝas antaŭ niaj okuloj bildo de riĉeco kiel fiera sukceso de senlaca laboro.

Do, karaj ĝesamideanoj, ĉio jam prepariĝas por bonvenigi kaj akcepti vin ĉiujn en la gaste-maj muroj de la mondfama banurbo. Pentekostaj tagoj, tagoj de l' migrado, instigu ankaŭ vin por migri; via parolo do estu: antaŭen al la IVa Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso! Sendu jam hodiaŭ vian aliĝilon al la Loka Kongresa Komitato. Ĉio jam estas preta por akcepti kaj gastigi vin. Ni ĉiuj bonvenigas vin! Do, ĝis revido!

Berthold Guttman, del. de UEA,
Běhánky-Teplice.

KAREL CAPEK:

FABRIKEJO DE ABSOLUTO.

III. ĉapitro. Panteismo.

Prezidanto Bondy havas ian senton, kvazaŭ li estus en sonĝoj. Marek metas lin kun patrino zorgo en apogseĝon kaj rapide serĉas konjakon. „Jen, eltrinku tion rapide“, li balbutas, prezentante al li la kaliketon per tremanta mano. „Ĉu ne, al vi ankau fariĝis malbone?“ „Kontraŭe“, per nefirma lango diras Bondy. „Ĝi estis bela... tiel bela, homo! Ĝi estis al mi, kvazaŭ mi flugus, aŭ iel simile.“

„Jes, jes,“ Marek diris rapide, „ĝustion mi pensas. Kvazaŭ vi flugus aŭ ĝenerale iel ŝvebus, ĉu?“

„Treege feliĉega sento“, diris S-o Bondy. „Mi pensas, ke tion oni nomas entuziasmo. Kvazaŭ tie estus io — io —“

„— io sankta?“ demandis hezite Marek.

„Eble. Tute certe, homo! Neniam mi iras en preĝejon, Rudo, neniam, sed en tiu keĉo estis al mi kiel en preĝejo. Mi petas vin, kion mi tie faris?“

„Vi genuis“, ekmurmuris Marek ama-

re kaj komencis promeni tra la ĉambro.

Prezidanto Bondy karesis embarase sian kalvaĵon. „Tio estas stranga. Ĉu vere mi genuis? Kaj mi petas vin, kio — kio envere — en tiu kelo — tiel strange efikas je homo?“

„La Karburatoro“, ekmurmuris Marek, mordetante siajn lipojn. Lia vango aspektis, kvazaŭ ĝi pli malgrasiĝus kaj pli paliĝus.

„Vere strange“, miris Bondy, „kaj kiakauze?“

Inĝeniero Marek nur ekskuis la ŝultrojn kaj promenis tra la ĉambro kun klinita kapo.

G. H. Bondy lin okule sekvis, infane mirante. Marek estas frenezulo, li diris al si; sed kio, je ĉiuj diabloj, surfalas onin en la kelo? Tia turmenta feliĉego, tia grandega certeco, mirego, konsterniga pieco aŭ kio — S-o Bondy stariĝis kaj enverŝis al si novan kaliketon da konjako. „Vi, Marek,“ li diris, „mi jam komprenas.“

„Kion vi komprenas?“ abrupte diris Marek kaj haltis.

„Tion en la kelo. Tiun strangan animstaton. Tio estas ia venenigo, ĉu?“

„Certe venenigo“, Marek ekridis furioze.

„Mi tuj pensis tion,“ deklaris Bondy, tuj kontentigita. „Via aparato produktas do ion, hm, ion kiel ozono, ĉu? Aŭ pli ĝuste, iun venenan gason. Kaj kiam oni tion satenspiras, do ĝi onin... iom... venenas aŭ ĝajigas, ĉu? Certe, homo, ĝi estas nenio alia ol venenaj gasoj; verŝajne ili iel produktiĝas en tiu — en tiu via Karburatoro. La lumgaso, aŭ paradiza gaso, aŭ fosgen aŭ io tia. Pro tio vi tie havas tiun ventolilon, kaj pro tio vi iras en la kelon kun tiu ĝasmasko, ĉu? Vi havas tie malbenitajn gasojn.“

„Se tio estas sole gasoj,“ eksplodis Marek, minacante per la pugnoj. „Vidu, Bondy, pro tio mi estas devigata vendi la Karburatoron! Simple, mi tion ne kapablas toleri, ne kapablas, ne kapablas“, li kriadis, preskaŭ plorante. „Mi ne antaŭscietis, ke mia Karburatoro faros tion ĉi! Tian — teruran — eksceson! Pensu nur, tion ĉi ĝi faras al mi de la komenco! Kaj ĉiu, kiu proksimiĝis al ĝi, sentas tion. Vi scias ankoraŭ nenion, Bondy. Sed nia

domservisto fariĝis ties ofero.“

„Ha, bedaŭrinda“, ekmiris komplete S-o prezidanto. „Li mortis pro tio?“

„Ne, sed li konvertiĝis“, ekkriis senespere Marek. „Al vi mi tion diras, Bondy: Mia inventaĵo, mia Karburatoro havas teruran difekton. Tamen, spite ĉio, vi ĝin aĉetos aŭ akceptos de mi donace; vi certe, Bondy, eĉ se diabloj ŝutiĝus el ĝi. Al vi, Bondy, ĉio estas indiferenta, nur se vi profitaĉos miliardojn el tio. Vi ilin profitaĉos, homo. Ĝi estas grandega afero, sed mi ne plu volas havi ion komunan kun ĝi. Vi ne havas tiel senteman konsciencan kiel mi, ĉu vi aŭdas Bondy? Miliardojn ĝi profite donos, milojn da miliardoj; sed vi devas preni sur vian konsciencan teruran malbonon. Decidu!“ —

„Lasu min en trankvilo“, defendis sin S-o Bondy. „Se ĝi produktas venenajn gasojn, la oficoj tion malpermesos kaj estas fino. Vi konas niajn malvastajn cirkonstancojn. Jes, en Ameriko, eble —“

„Tute ne venenaj gasoj“, eligis el si la inĝeniero Marek. „Io milfoje pli malbona. Atentu, Bondy, kion mi diras al vi; ĝi superas la homan racion, sed ne estas en tio eĉ iomete da trompo. Do, mia Karburatoro efektive forbruligas la materion, plene forbruligas, ke eĉ ne polvo restas el ĝi; aŭ pli ĝuste, ĝi rompas ĝin, atomigas, elektronigas, konsumas, formuelas, mi ne scias tion nomi; mallonge, ĝi tute ĝin konsumas. Eĉ ne ideeton vi havas, kia grandega energio ekzistas en la atomoj. Kun duoncento da kiloj da karbo en la kaldrono vi povas ĉirkaŭnavigi la tutan mondon, lumigi la tutan Praha, movigi la tutan fabrikejon de Ruston aŭ kion ajn vi volas; per nukseto da karbo vi hejtos kaj kuiras por tuta familio. Kaj fine, eĉ ne karbon oni bezonos; oni hejtos per la unua silikŝtoneto aŭ plenmano da argilo, kiun oni prenos de antaŭ la domo. Ĉiu peceto de materio havas en si pli da energio, ol la vapora kaldrono; nur elfordi ĝin! Nur kapabli perfekte forbruligi la materion! Bondy, mi tion kapablas; mia Karburatoro tion kapablas; vi rekonos, Bondy, ke tio estas inda de dudekjara laborado.“

„Vidu, Rudo,“ komencis malrapide S-o prezidanto, „ĝi estas terure stran-

ga; sed mi vin ial kredas. Je mia animo, mi vin kredas. Sciu, kiam mi staris antaŭ via Karburatoro, mi sentis, ke tie estas io terure granda, io, kio fakte konsternas onin. Mi ne povas helpi min, mi vin kredas. Tie malsupre, vi havas ion misteran. Ion, kio renversos la tutan mondon.“

„Ah, Bondy,“ tire flustris Marek, „ĝuste en tio estas la komplikigo. Atendu, ĉion mi diros al vi. Ĉu vi iam legis Spinoza?“

„Ne.“

„Mi ankaŭ ne; sed nun, sciu, nun mi komencas legi tiajn aferojn. Mi tion ne komprenas, por ni teknikistoj ĝi estas treege malfacila afero, sed ian kernon ĝi havas. Ĉu vi eble kredas je Dio?“

„Mi? Nu,“ meditis G. H. Bondy, „je mia animo, mi vere ne scias, Eble ekzistas Dio, sed sur iu alia stelo. Ĉe ni ne. Tute ne! Io simila neniel konvenas por nia tempo. Mi petas vin, kion li farus ĉi tie?“

„Mi ne havas kredon,“ diris malmole Marek. „Mi ne volas kredi. Ĉiam mi estis ateisto. Mi kredis je materio kaj progreso, je nenio alia. Mi estas homo scienca, Bondy; kaj la scienco ne povas allasi Dion.“

„El la vidpunkto de la komerco“, deklaris S-o Bondy, „tio estas tute indiferenta. Se li volas, li trankvile ekzistu. Ni ne malhelpas unu la alian.“

„Sed el la vidpunkto de la scienco, Bondy,“ severe ekkriis la inĝeniero, „ĝi estas absolute netolerebla. Aŭ li, aŭ la scienco. Mi ne asertas, ke Dio ne ekzistas; mi nur asertas, ke li ne rajtas ekzisti, aŭ almenaŭ, ke li ne rajtas manifestiĝi. Kaj mi kredas, ke la scienco forpuŝas lin, paŝo post paŝo, aŭ almenaŭ ke ĝi malebligas liajn manifestojn; kaj mi kredas, ke tio estas ĝia plej granda misio.“

„Estas eble“, diris S-o prezidanto kviete. „Daŭrigu do.“

„Kaj nun prezentu al vi, Bondy, ke — Aŭ, atendu, jene mi tion diros al vi: ĉu vi scias, kio estas la panteismo? Tio estas la kredo, ke en ĉio ekzistantanta sin manifestas unu Dio, aŭ Absoluto, kiel vi volas. En la homo, kaj ankaŭ en la ŝtono, en la herbo, en la akvo, ĉie. Kaj ĉu vi scias, kion instruas

Spinoza? Ke la materieco estas sole manifesto aŭ unu flanko de la dia substanco, dum la alia flanko estas la animo. Kaj ĉu vi scias, kion instruas Fechner?“

„Ne scias,“ konfesis la prezidanto Bondy.

„Fechner instruas, ke ĉio, absolute ĉio, havas animon, ke Dio estas animo de ĉiu materio sur la mondo. Kaj ĉu vi konas Leibniz? Leibniz instruas, ke la materio konsistas el eroj de animo, monadoj, kies esenco estas dia. Kion vi diras pri tio?“

„Mi ne scias,“ diris G. H. Bondy, „mi tion ne komprenas“.

„Mi ankaŭ ne; ĝi estas ferure komplika. Sed prezentu al vi, ke — supozate — en ĉiu materio vere ekzistas Dio, ke li estas iel enfermita en ĝi. Kaj kiam vi la materion plene rompas, li elflugas kiel el skatoleteto. Li subite estas kiel malligita. Li evoluas el la materio kiel la lungaso evoluas el karbo. Vi forbruligas unu atomon kaj subite vi havas kelon plenan da Absoluto. Estas miriga, kiel ĝi tuj disvastiĝas“.

„Haltu“, aŭdiĝis S-o Bondy. „Diru tion ankoraŭ unufoje, sed malrapide“.

„Prezentu do al vi,“ Marek ripetis, „ke, — supozate — ĉiu materio enhavas Absoluton en ia ligita stato, ni diru kiel ligitan, inertan energion, aŭ, simple, ke Dio estas ĉieekzistantanta, ke li do estas en ĉiu materio kaj en ĉiu ero de la materio. Kaj nun prezentu al vi, ke pecon da materio vi tute detruas, ŝajne sen resto; sed ĉar ĉiu materio estas fakte Materio plus Absoluto, vi detruis sole la materion kaj restis al vi nedetruobla resto: pura, liberigita, aktiva Absoluto. Restis kemie nemalkomponobla, nemateria residuum, kiu montras nek spektrajn liniojn, nek atomezon, nek kemian afinemon, nek la leĝon de Mariotte, nenion, tute nenion el la ecoj de la materio. Restis pura Dio. Kemia nenio, efikanta kun grandega energio. Ĉar ĝi ne estas materia, ĝi ne dependas de la leĝoj de la materio. Jam el tio rezultas, ke ĝi manifestiĝas kontraŭnature kaj vere mirakle. Ĉio ĉi rezultas el la supozo, ke Dio enestas en la materio. Ĉu vi kapablas prezenti al vi, ke — ni supozu — li estas en ĝi?“

„Mi kapablas“ diris Bondy, „Kaj la pluo?“

„Bone,“ diris Marek kaj stariĝis „li do estas vere en ĝi.“

El la ĉefo: Rud. Hromada.

Dr. ST. KAMARYT:

TEMPERAMENTO.

La populara psikologio klasigas la psikajn fenomenojn sub pensado, sentado kaj volado, kaj la respondajn individuajn kapablecojn sub talento, temperamento, karaktero. La vorto temperamento, kiom oni povas uzi ĝin en senco psikologia, estas termino tre vasta, kiu signifas emocian konstituon de individuo, ĝian heredan emociemon kaj emocioblon kaj tipecon de ĝiaj emociaj reakcioj. Same indikas talento konstituon intelektan, karaktero konstituon volecan.

La teorio pri temperamentoj estis unuan fojon formulita de la greka kuracisto Galeno (131—210 post Kristo), kies klasigo atentis samtempe fortecon kaj daŭrecon de la emociaj reakcioj. Oni ricevas jenan skemon:

Reakcio:	Forta	Malforta
Rapida Malrapida	Kolerika Melankolia	Sankvina Flegma

Kolerika temperamento estas facile ekscitema al fortaj emocioj, sed same facile forturnema; flegma temperamento ekscitiĝas malrapide al emocioj malfortaj; simile oni povas priskribi la ceterajn temperamentojn.

Tiu ĉi klasigo de temperamentoj estis eminenta divido, ĉar ĝi restis uzebla ĝis niaj tagoj. Nur en la 18. jarcento oni provas anstataŭi klasigon Galenan per iu alia. Sed nur niaj tagoj alportis provojn, kiuj eble povos esti pli uzeblaj ol la klasika divido. La plej grandan sukceson ricevis germana psikologo Kretschmann per sia verko „Körpa konstituo kaj karaktero“ (Körperbau und Charakter) el jaro 1926.

Kretschmann montras, kiom kaj kiel la homaj temperamento kaj karaktero dependas de la korpaj ecoj, de la ĝenerala staturo kaj de kvalitoj de la diversaj korpaj organoj. Li dividas tri ĉefajn homajn tipojn,

1. **Piknika tipo** havas ĉiujn korpajn kavaĵojn rilate pli larĝajn (kranio, brusto, ventro, pelvo). La kapo estas sfera, vizaĝo plena kun harmoniaj trajtoj, distanco inter frunto kaj supra lipo malgranda. Maksimuma alteco ĉe viroj 167 cm, ĉe virinoj 156. Manĝemo kaj trinkemo rimarkindaj, tial tendenco dikiĝi. Piknikuloj laŭregule estas societemaj, parolemaj, volonte oratoras, ne tro ordamaj, influeblaj facile de amasaj movadoj, kapablaj kun senti kun la aliaj. Ili estas bonaj laborantoj, energiaj, kun kompreno por praktika vivo. Estas inter ili malmultaj matematikistoj, sed multaj natursciencistoj kaj kuracistoj. Inter ilin apartenas kondukantoj de revolucioj, same kiel majstroj de kompromiso. Konataj tipoj piknikaj estas Humbold, Mirabeau, J. Hašek, Švehla, Privat.

2. **Astenika tipo** estas longeca, la kapo sidas sur longa kolo, vizaĝo estas maldika, longeca, nazo tre elpenetras, mentono kvazaŭ perdiĝus malantaŭen, la korpaj pezo estas subnormala. Signoj de maljuneco aperas baldaŭ. Ankaŭ spirite estas la astenikuloj inversuloj de la piknikuloj. Tre disvolvita estas ĉe ili senco por ilia propra persono, ili scias eluzi la societeton por siaj propraj celoj, sian propran konvinkon ili nepre volas kaj scias altrudi al la ceteraj. Ilia celo ĝenerale estas alten metata, havu ĝi tendencon aŭ vaste homaranan aŭ malvaste egoisman; tial ni trovas inter astenikuloj plej multajn eminentajn virojn sed same tre multajn fantaziulojn kaj tre multajn egoistojn, tiranojn, avarulojn. Iam oni trovas inter ili tre tipajn aristokratajn karakterojn. Ekzemplo de nobla astenikulo estas prezidanto Masaryk. Aliaj: Hodža, Cart.

3. **Aletika tipo** havas fortajn ostojn kaj muskolojn, precipe fortan zonon muskolan inter brakoj sur brusto. La brusto estas larĝa, kavaĵoj ventra kaj pelva mallarĝaj, kapo osteca, frunto alta, mentono longforma, vizaĝo ovala. Haŭto forta, rigida, graseco normala. Spirite ili sufiĉe similas la astenikulojn, sed la plej karakteriza ilia trajto estas samtempe ĉe ili ekzistanta kapablo esti altgrade ekscitemaj kaj same indiferentemaj. Interne bolante

la atletikuloj ekstere estas senintere-semaj. Inter ili estas plej ofte matematikistoj kaj belartistoj kun aristokrataj plaĉoj; ankaŭ tre multaj metafizikistoj apartenas inter ilin. Kiel ekzemplo estu citita skulptisto Ŝtursa.

Estas memkomprenebla afero, ke la klasoj kreitaj de Kretschmann ne povas esti rigardataj kiel helpilo, kiu donus temperamenton de homo kiel unudirektan kvantecon, tion ja neniu simila divido povos doni, ĉar homa individuo estas produkto de heredo, do plejparte ĝi estas tipo miksitaj, kiel Kretschmann prave argumentas. Lian dividon malaprobas Klages, kiu volas havi sole du ĉefajn tipojn temperamentajn: abrupta kaj kvietaj; inter ili estus tuta vico de temperamentoj miksitaj.

IOM DA ORDO.

P. E. St.

Suba artikoleto, skizita kvazaŭ por krestomatio, celas montri kiel per reciproke interligitaj frazoj oni povas fiksi aŭ pliklariĝi signifon de ĝeneralaj vortoj kiuj rilatas al biologio, konsiderataj ne laŭ faka scienca maniero, sed el vidpunkto de komuna literaturo lingvo. Tiuj vortoj kies signifo & senco nenie estas difinita en klara & sankciita formo (internacie-esperanta), prezentas en nia medio bedaŭran malordon, kaoson. Unu uzas „besto“ en ĝenerala senco, tie kie alia uzas „animalo“. Alia uzas „besto“ nur pri grandaj mamuloj. La vortoj „vivajo“, „vivulo“, „organismo“, „animalo“, k. a. estas uzataj jen laŭ unu, jen laŭ alia senco, kies nuancojn neniu povas kapti. Tiu eta provo estu akceptita kiel sugesto finfine komenci utilan ordigan laboron pri nia vortaro, kiu similas al iu ĝardeno sufokata de fiherboj, kardoj, urtikoj — ĉar la ĝardenisto lasis ĝin al la „libera evoluo“.

Neorganika mondo da mineraloj, rokoj, kemiaj inertaĵoj, kiuj formas terkruŝon, portas kaj nutras movemajn ĉelarojn, kies variado dependas de suna energio. Tiu organika estaĵaro estas studa objekto de biologio (kun ĝiaj branĉoj: zoologio, botaniko, fiziologio, histologio, anatomio, biokemio, k. a.).

Normala funkciado de la organikaĵoj havas nomon „vivo“. La vivo komencas per ĝermo, „nasko“, ĝi plejas en „maturado“, kaj finas en „morto“.

La vivestaĵoj, komplikaj organaroj, estas adaptitaj por „vivi“ t. e. konservi sin (per defendo kontraŭ detruoj), plimultiĝi sin (per seksa procedo) kaj produkti utilaĵojn, kiuj poste servas por alies konservado, plimultiĝo. La konservado, dismultiĝo & produktado bezonas elspezon de energio kaj materio. Por havigi al si tiun ĉiutage, ĉiuminute elspezatan energion kaj materion, la vivestaĵo nutras sin per manĝado, trinkado, spirado, absorbante la materion en ĝiaj tri formoj: solida, fluida, gasa. Kune kun tiu triforma materio eniras vivestaĵon ankaŭ la energio. Alia parto da necesa energio eniras rekte de la suno per radiado.

La vivestaĵo komencas vivi en formo de ovo jen granda kiel birda ovo, jen mikroskopie eta, jen kiel sporo, grajno, semo, nukso, ĝermo. Tiu ovo disvolviĝas aŭ interne en patrinkorpo aŭ ekstere (birdoj, fiŝoj, reptilioj, insektoj). Fine el la ovo aperas individuo: aŭ plenforma ido (ekzemple kokido, fiŝeto) aŭ larvo, kiu traĭros plurajn metamorfozojn antaŭ ol atingi plenforman staton. Do, ido, infano bezonas nur kreski, plifortigi sian etajn korpopartojn. Larvo bezonas unue kreski, poste transformiĝi: ekzemple, raŭpo iĝas krialido, el kiu poste aperas papilio.

Sur la grundo kaj en la maro vivas du esence malsamaj kategorioj da vivestaĵoj: vegetaloj kaj animaloj. La vegetaloj aŭ „kreskaĵoj“ estas ekzemple: herbo, algo, fungo, arbo, ŝimo, musko, likeno. La animaloj — muso, rano, homo, elefanto, birdo, lacerto, muŝo, vermo, formiko, pulo, akaro. Vegetaloj povas vivi sen animaloj, sed animaloj ne povas vivi sen vegetaloj. Tiel, la vegetaloj formas bazon de la animala vivo. Likeno nutras sin el roko, aero, akvo. Leono nutras sin per karno de aliaj mambestoj, kiuj sin nutras per herbo, folioj, fruktoj. Per verda klorofilo la vegetaloj absorbas sunan energion, transformante kaj deponante ĝin en formo de amelo, sukero, rezino. Peco da terkarbo estas kvazaŭ peco da suno kiu lumas, varmigas. Per cikloj

de cirkulado la vegetaloj kaj animaloj formas unu harmonian tuton, intersolidaran, saĝe organizitan, reciproke kompensantan, kune dependan de alia granda cirkulado de ventoj, aerblovoj, marfluo, pluvoj, riveroj, kiu turnas sub la potenca gvidado de la suno.

ZAMENHOF-RADIKARO

de Eugen Wüster.

Prizorgita de Paul Kirschke. Eldonita de Hirt & Sohn, Leipzig, 1927. (Pĝ. 84 de leksika formato. Prezo RM 6.— = Kĉ 48.—.)

Kiel ajn kreskos, riĉiĝos kaj ŝanĝiĝos esperanto, oni ĉiam forte interesos sin pri la lingvaj opinioj kaj principoj de la fondinto kaj la plej granda majstro de la lingvo. La lingvo uzata de Zamenhof estos ĉiam elirpunkto, plejparte eĉ modelo por ĉiu laboranto en esperanto kaj fidinda apogilo de la unueca evoluo de la lingvo kaj jam per tio apogilo de unueco de la movado. Lingva riĉaĵo de la literatura heredaĵo de Zamenhof — konsistanta el „Fundamento de esperanto“, „Lingvaj respondoj“, „Fundamenta krestomatia“ kaj vico da majstraj tradukoj el la mondliteraturo — estos objekto de ĉiufankaj studoj — ju pli malfrue, des pli multe — de multaj zamenhofistoj nekriantaj pri la fideleco kaj perfideco, sed sindone kaj penplene laborantaj, studentaj, esplorantaj, klarigantaj kaj instruantaj ĉiujn detalojn de la Zamenhofaj vortoj, frazoj, stilo ktp.; oni zorgas ilin kolektos kaj analizos por trovi kaŝitajn kaj kiel konscie tiel intue aplikatajn konsilojn kaj leĝojn, kiujn oni sisteme kaj sinseze ordigos, klasigos en firmajn teoriajn principojn, sur kiuj bazas nia lingvo kaj ĝia venonta evoluo.

La unua kaj ĉefa paŝo por tio estos la leksikografia prilaboro de la verkoj de Zamenhof en „Zamenhof-Konkordanco“ enhavanta ĉiujn radikojn, derivaĵojn, parolturnojn trovitajn ĉe Zamenhof kun indiko de la trovlokoj (se ni ne posedas specialajn vortarojn kaj frazarojn al ĉiu aparta verko de Zamenhof). Tiun ĉi signifan meritplenan faron de granda teoria kaj praktika valoro kaj utilo promesas al ni nia ĉefa esperantologo germana samideano **Eugen Wüster**, aŭtoro de granda „Enciklopedia vortaro“ (vidu „La Progreso“ 1926, pĝ 98.) kaj perfekta plenumanto de taskoj kaj devoj neefektivigataj de „Lingva komitato“ kaj „Akademio“.

Prepara verko por tiu ĉi konkordanco estas

„Zamenhof-radikaro“ science verkita de Wüster kun helpo de kelkaj kunlaborantoj (precipe de filologo Kirschke). Tiu ĉi nova verko el la bonega laborejo de Wüster enhavas neoficialajn (= neenhavitajn en „Universala vortaro“ kaj ĝiaj „Oficialaj aldonoj“) radikojn prese aŭ skribe uzitajn aŭ rekomenditajn aŭ aprobitajn aŭ toleratajn de Zamenhof. Ĝi fakte konsistas el tri (alfabetaj) vortaroj: 1. radikaro el tekstoj (libroj, artikoloj kaj leteroj) sendube verkitaj aŭ tradukitaj de Zamenhof (inkludante germanajn esperanto-vortlibrojn aprobitajn de li kaj ekskludante Fabelojn II. de Andersen kaj parton de Biblio), 2. radikaro el tekstoj de aliaj aŭtoroj en „Fundamenta krestomatia“ redaktita kaj sekve lingve kontrolita de Zamenhof, 3. radikaro el fremdaj, sed de Zamenhof reviziitaj tekstoj en la gazeto „La Esperantisto“ (escepte kelkajn numerojn). Eble iu preferus unu solan radikaron kun indikoj pri tiu ĉi trifonta aparteno aŭ deveno ĉe ĉiu radiko, sed ankaŭ tiu ĉi triparta aranĝo (Zamenhofa, Krestomatia, Esperantista) havas siajn preferojn.

La verko registras kaj analizas pli ol tri mil radikojn (krom multaj derivaĵoj): 1. proksimume 2200 radikojn el verkoj de Zamenhof, 2. pli ol 300 radikojn de 59 aŭtoroj el „Krestomatia“, 3. ĉirkaŭe 640 radikojn de 103 aŭtoroj kunlaborintaj en „La Esperantisto“ (1889-1895). Ĉiu radiko kaj derivaĵo estas akompanata de indiko de trovloko kaj al multaj (neoftaj) radikoj estas aldonitaj koncizaj klarigoj; alie oni supozas la posedon de detala nacilingva vortaro, al kiu tiu ĉi eldonaĵo estas simpla, sed valora aldono.

Gravan parton de la verko prezentas vasta (13paĝa) traktaĵo pri asimilo (grado de esperantigo) de vortoj kaj precipe detala bibliografio (listo de 124 verkoj) de la literatura agado de Zamenhof. En la verko oni trovas utilajn instruojn kaj informojn, kiujn oni ne serĉus sub ĝia modesta titolo. Kompreneble tiu ĉi helpilo „ne volas anstataŭi la posedon de la verkoj de Zamenhof, sed sole faciligi ilian lingvan ekspluaton“, ĝi simple respondas demandojn: ĉu, kiel, kie, kiam uzis Zamenhof tiun aŭ alian neoficialan radikon aŭ derivaĵon, kaj ebligas trovi tiun uzon en la originalo; tial ĝi estos utila kaj serĉata helpilo por esperantaj verkistoj, gramatikistoj, instruistoj ktp., al kiuj ĝi multe faciligos ĉiujn laborojn koncernantajn la studojn pri la lingva uzo de Zamenhof. Ĝi estas bela frukto de konscienca laboro de vera zamenhofisto, frukto de laboro kaŝita por neinformitoj, nerimarkita de leĝan-

toj, nevidebla el la preta verko, tamen granda kaj laciga, postulanta ageman talenton, sinoferan diligenton kaj sisteman ordon, por kiu ne sufiĉas kriema buŝo kaj senfaraj gestoj.

Kritiki la metodojn kaj rezultatojn de laboro de la aŭtoro ne estas celo de tiu ĉi artikoleto (eble oni povus riproĉi nesufiĉan apartigon de formoj komence uzataj, sed poste plene forlasitaj de Zamenhof k. s.); tiuj ĉi linioj volas esti simpla informo kaj atentigo pri la bona verko montranta, kiel oni povas utile labori kaj kiel oni utile laboras por profundigi konojn kaj sciojn pri lingva uzo de Zamenhof (jen la plej bona kaj efika ekzemplo de nekrianta fideleco!); ĝi volas vekti komprenon kaj respekton por vera fruktodona laboro kaj reala merito. Nenio mankas al ni pli multe ol efektiva laboro, tial ni respektu ĝin, ĉu ĝi estas propaganda laboro de Privat, ĉu praktikaj servoj de U. e. a., ĉu lingva laboro de Wüster kaj de liaj kunlaborantoj! Laboro sole laboro, ne senfruktaj paroloj kaj senpovaj planoj venigos al ni finan sukceson.

bŝk.

PRI LA LANDNOMOJ.

Verkis Th. Cart. Eldonis „Esperantista voĉo“ (Jaslo 1927). „Kolekto de la Akademio“ (pĝ 16, prezo ?).

Almenaŭ unufoje dum ĉiu jaro aperas ciklulo, flugfolio aŭ alia presaĵo de la prezidanto de nia Akademio dediĉita al la problemoj, pri kiu parolas tiu ĉi broŝureto postulanta, ke oni uzu:

1. landnomojn kreitajn per la sufikso -uj el la ĝentonomoj de malnovomondaj ŝtatoj (inkluzive: Egipto, Egiptujo),

2. loĝantnomojn kreitajn per -an el la landnomoj de novomondaj ŝtatoj (ekz. Brazilo, Brazilano: Ĉilo, Ĉilano), kaj

3. forte malaprobanta la landnomojn kun -io (Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio, Latvio ktp.).

Sajnas, ke la persistema prezid. de Akademio (aŭ la tuta Akademio?) dediĉanta ĉiun sian energion al tiu ĉi afero kredas, ke la forigo de -io estas kondiĉo de fina venko de esperanto. Nu, ni simplaj esperantistoj kontraŭe kredas, ke estas tute egale uzi -ujon, -landon, aŭ -ion (neniu formo estas kontraŭfundamenta!) ĉar la ĉefa kaj sola bezono estas: facila kaj senduba komprenebleco, kaj ĉiuj nomitaj formoj estas facile kaj sendube kompreneblaj, sekve bonaj. La aŭtoro kaj la eldonintoj penas krediĝi, ke uzanto de -ujo estas bona, sed tiu de -io malbona esperantisto. Nu, ni neoficialaj esperantistoj ne akceptas tian kredon, precipe se ĝi volus tuŝi samideanojn, kiuj ĝenerale uzas bonan, ofte klasikan, esperanton. Laŭ nia juĝo decidus, kion realan iu faris kaj kion realan li atingis. Esperantisto sukcese laboranta por vastigo kaj apliko de esperanto, sed uzanta landnomojn kun -io estas laŭ ni

pli valora por la movado ol esperantisto zorge uzanta la landnomojn kun -ujo, sed nenion faranta por la efektiva vastigo de la movado. aŭ por la riĉigo de la lingvo. Unu scienca verko en esperanto (eĉ simpla traduko) estas pli valora por niaj lingvoj kaj literaturo ol mil traktajoj pri tiel ridinda bagatelaĵo, kia estas la problemoj -io. Estas senutila perdo de tempo, mono kaj energio dediĉitaj por tiaj eldonadoj, precipe se oni memoras, ke ekzistas multaj aliaj vere gravaj, eĉ urĝaj lingvaj problemoj, pri kiuj nia Akademio neniel zorgas kaj por kiuj ĝi ne havas sufiĉe da tempo, mono kaj energio. Ne maltrankviligu per neutilaj kvazaŭ-problemoj, sed solvu la verajn utilajn problemojn! Jen modesta opinio de simpla uzanto de esperanto!

bh.

DEK DEMANDOJ.

II. 11.—20.

La respondojn al la dua serio de la demandoj sendis entute kvin personoj. En parentezoj ni notas sumon de poentoj (ĝuste responditaj demandoj): Mat. Louda Praha (9), Jar. Grodl Bystřice n. Pern. (8), Wojewoda Józef por Esp. Sekcio de Pola laborista gimnasta societo Sila en Ostrava (7), V. Jaroš Místek (6) kaj J. Haman Hnidousy (6). La libran premion ricevas S-ro Louda.

Respondoj 11.—20.

11. Ĉiuj nomis almenaŭ tri romanojn. En 4 respondoj troviĝis Abismoj, en 3 Stranga heredaĵo, Pro Iŝtar kaj Saltego trans jarmiloj.

12. En Svislando okazis 3 esp. kongresoj: la Dua en Genevo 1908, la Naŭa en Bern 1913, la Deksepa en Genevo 1925.

13. En Esperanto aperas du semajnaj gazetoj: Heroldo de Esperanto kaj Sennaciulo.

14. Fundamento de Esperanto (1905) konsistas el: Antaŭparolo, 16-regula Fundamenta gramatiko, Ekzercaro kaj Universala Vortaro.

15. La plej granda vortaro de esperanto estas Enciklopedio Vortaro de Wüster; aperis jam 3 volumoj ĝis „iri“, la tuta verko enhavos ankoraŭ 4 volumojn.

16. D-ro Schulhof Stanislav, estis dentisto en Pardubice, esp. poeto eldoninta tri volumetojn de originalaj poemoj: Aŭtunaj floroj, Kion la vivo alportis, Per espero al despero. Krome li tradukis ĉeĥajn poemojn (verketo: Bohemaj grenatoj), fondinto kaj prezidanto de E. Klubo Pardubice. Mortis 1919.

17. Celo de la demando: „Provu diveni kiom da membroj havas CAE en 1927“ estis instiĝi la leĝantojn, ke ili pripensu la situacion de CAE kaj donu sian opinion pri ĝia stato. Respondoj estis: ne pli ol 600, proksimume 500, 550, proksimume 425—485 membroj. Fakte, CAE havis en 1927 entute 382 m.

18. La unua esp. klubo sur la teritorio de CSR estis la klubo de Brno, fondita en 1901.

19. Por kotizo 16 Kč jare CAE donas librajn premiojn: Svaz národů o esperantu 48-paĝa; Devoj de la Homo 164p.; Jak byl rozřešen problém jazyka mezinárodního v obchodu 44p.; Collinson: Esperanto a jeho kritikové 24p.; Paeduka konferenco en Praha 1927.

20. La ĉefa komponisto Suda komponis melodion al la poemo de D-ro Zamenhof: Al la Fratoj. Suda mem estas blindulo vivanta en Plzeň.

Kiel videble, la respondoj estas sufiĉe simplaj kaj certe multaj niaj legantoj kapablu ilin respondi eĉ sen helpo de libroj. La nombro de partoprenantoj povis do esti pli granda. Krom la aferoj ĝenerale konataj ni enmetas demandojn pri faktoj interesaj, sed ne multe konataj precipe al la postmilitaj esperantistoj. Iuj respondoj estis tre detalaj (ĉe S-ro Louda ĉiuj).

DEK DEMANDOJ.

3. serio, 21.—30.

21. Kie kaj kiam okazis la Unua internacia kongreso de esperanto? Kie kaj kiam la Dektria?

22. Kiuj komunumoj en ĈSR havas Zamenhof-straton?

23. Kiuj urboj en ĈSR havas Zamenhof-monumenton?

24. Kiuj ĉefaj esperanto-lernolibroj ekzistas?

25. Kion signifas la mallongigoj: UEA, CAE, GEL, ICK, K. R., L. K., L. K. K.

26. Kio estas Internaciaj Floraj Ludoj?

27. Kio estas verkinto de Fundamenta Krestomatio?

28. Kio estas aŭtoro de la principo de sufiĉo kaj neceso?

29. El kio devenas la citaĵo: Eĉ ĝuto malgranda konstante frapante traboras la monton granitan?

30. Kiu verkis la unuan originalan romanon esperantan?

Respondojn sendu antaŭ la 15. Majo.

Partoprenu en tiu ĉi amuza revizio de viaj scioj!



PREKLAD 23. TEXTU.

Do dané lhúty došly 23 překlady. Účastníci se: J. Brych Praha, Jar. Grodl Bystřice nad Pernštýnem, Brettschneider Olomouc-Pavlovice, Vl. Slaný Zábřeh n. O., Em. Chudoba Stonava, Fr. Drlík Brno, Esp. sekció de Pola laborista gimnasta societo Sila en Mar. Hory, Ant. Slanina Orlová, Impsal K. Košice, Fr. Kuba Olomouc, Ant. Tyl Prostějov, Konrád Krejčí Olomouc, Pavel Rosa Bratislava, Fr. Kučera Kunovice, M. Čiperová Plzeň, Jindř. Huser Malenovice, J. Moder Vogeleis, Jan Saska Řeky, J. Haman Hnídousy, Tonča Mrázková Olomouc, Josef Maršík Počaply, Števa Bálková Žižkov, Václav Cermák Kolín.

Počet překladatelů mohl býti větší, nicméně jsme spokojeni a zvláště potěšila nás kvalita překladů. Z mnoha nejlepších vylosovali jsme dva a zaslali p. Rosovi v Bratislavě a p. Hamanovi v Motyčíně odměnou po knize.

Laboro sub la tero(1) estas unu el la plej kruelaj(2), per kiuj la homo estas ŝarĝita(3), kaj ĝia tragiko estas(4) (en tio), ke ĝi restas kaŝita por ĉiuj homoj. La karboministo(5) estas ĉirkaŭita de morto kaj li spiras(6) morton. En

ŝakto, du paŝojn de li(7), oni ne vidas lin pro nuboj de karba polvo, en kiu li kaŭras(8). Se laboro estas homa destino, ĉiuj vi nevidintaj(9) kredis, ke tio ĉi estas laboro nehoma. Ĝi estas heredata(10) de unu generacio al la alia kiel malbeno de familioj(11) kaj sur neniu kampo la socia politiko (mallongigante la laboron(12), kiun oni nomas laboraĝo) estis tiagrade(12) afero de la homa konscienco kiel sur ĉi tiu. La plej terura laboro kaj la plej necesa. La karbo estas komenco de l' industrio kaj la flamo el fajrero rabita el ĉielo(13) estingiĝas en ĝi,(14) se ĝin ne vivigis la nutraĵo el la putriĝinta subtero. Neniam ni vidas ilin, sed ili hejtas niajn forbruliĝas en niaj fandejoj, ili trenas niajn vaĝonarojn. Batalante(15) por sia ekzisto, ili batalas ankaŭ por la nia.

POZNÁMKY:

1. též: subtera laboro; sub surfaco de la tero je zbytečně podrobně;
2. peněžaj, fortostrečaj;
3. kiuj estas al la homo taske donitaj, donitaj kiel tasko;
4. konsistas en tio, ke;
5. dáme-li místo pouhého minísto slovo karbominísto, upozorňujeme tím hned čtoucího, že se jedná o uhlokopy;
6. eventuelně: li enspiras morton;
7. du paŝojn distance. Je distanco de du paŝoj de li je zbytečně obšírně;
8. li kurbiĝas;
9. vi ĉiuj, kiuj ne vidis;
10. ĝin heredas unu generacio de la alia kiel malbenon;
11. rodová kletba, kletba rodů, rodin, havírství se dědí v rodinách, tedy malbeno de familioj; ĝento je rod ve smyslu národ;
12. tiamezure, tiom;
13. nikoli firmamento — obloha. Oheň byl ukraden nebesům — bohům, dle báje;
14. nebo: tie ĉi (en la industrio);
15. též: luktante.

DIVERSA.

Grandan parton de tiu ĉi nro okupas la informoj el CAE. Bonvolu ilin legi atente. Se vi ne estas membro de nia centro, ne hezitu aliĝi.

La numero havas 24 paĝojn (kun Jazykové výklady). Tamen ni devis ellasi iujn rubrikojn pro manko de loko (El Ĉeĥoslovakio, Tra la ĝazetaro, Z esperantského světa k. a.) Ilin ni alportos venonte. Al samideanoj kunlaborantaj en la ĝazetara servo ni rekomendas engaĝetiĝi informojn antaŭajn, el kiuj preskaŭ ĉiuj estas eĉ nun aktualaj.

Red.

ATENTU!

Mi serĉas por mia 18-jara filino dum la venontaj ferioj

SOMERLOGEJON

en ĉefa, plej volonte instruista samideana familio, loĝanta en malgranda kampara urbo, aŭ granda vilaĝo, kie ŝi povus tutlerni la ĉefan lingvon. Proponojn adresu al Dir. Rudolf Löschner, Preschen ap. Bilin.

BULTENO

EL ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

NUMERO 25.

APRILLO 1928.

ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO EN 1927.

(Laŭ la raporto prezentita al la ĝenerala kunveno de ĈAE, la 1. Aprilo 1928.)

La komitato elektita en la ĝenerala kunveno la 13. Marto 1927 konstituiĝis jene: Prezidanto Jos. Eiselt, Praha; Viceprezidanto Dr. Stan. Kamaryt en Bratislava; Ĝenerala Sekretario Rud. Hromada; Kasisto Ferd. Votrubec. La ceteraj komitatanoj restis sen specialaj funkcioj. Fine de Majo S-ro Votrubec anoncis sian intencon rezigni, ĉar li fariĝis reprezentanto por ĈSR de poŝtista Ligo Internacia, kaj en julio li rezignis. La kasistan funkcion plenumis la ĝen. sekretario.

Membroj. La membrolibro de ĈAE enhavas ĝis fino de jaro 2213 nomojn, do ĝe 64 pli ol antaŭ unu jaro. Sed plenan kotizon aŭ ĝian ekvivalenton pagis 382 membroj. Inter ili estas 378 aktivaj, 1 subtenanta po 50 Kĉ, kaj 3 dumvivaj (po 500 Kĉ unufoje por ĉiam).

Dumvivaj membroj estas S-roj: Ing. Janeček, ministeria konsilanto Mil. Schmidt kaj komercisto M. Weisskopf, ĉiuj en Praha.

Subtenanta membro estis S-ro Novák Fr., Praha. Tiu ĉi kategorio estis kreita de la ĝenerala kunveno en 1925 por ebligi al vi akiri financon helpon por nia movado inter viaj amikoj-neesperantistoj, favoraj al nia ideo.

Aktivaj membroj. La supre nomita cifero 378 membroj komparata kun 466 en la pasinta raporto signifas pasivan diferencon de 88 membroj. Ĉu tio signifas, ke la movado ne plu alportas novajn homojn? Ne, inter la 378 membroj estas, kiel ni supre diris, 64 absolute novaj, kaj 38 iamaj membroj denove revenintaj. Entute do 102 novaj membroj kaj 276 malnovaj jam el jaro 1926. Vidiĝas do, ke la kaŭzo de la malkresko estas, ke 190 malnovaj membroj ne repagis sian kotizon por 1927. El ili nur kelkaj skribe anoncis sian ekŝigon, la ceteraj estas do, laŭ kutimoj en ĉiuj so-

cietoj, rigardataj kiel ŝuldantoj kaj ricevos admonilon. — La sumo de enspezitaj kotizoj estis Kĉ 5736 (en 1926: 7286.—, en 1925: 7391.—).

La 382 membroj troviĝas en 86 lokoj (en 1926: 126 lokoj, en 1925: 114 lokoj): En krampoj nombro en 1926:

116 Praha, en tio 101 Klubo (122, Klubo 110),

32 Olomouc (7),

31 Ústí n. Orlicí (54),

25 Hradec Králové (25),

24 Košice (27),

21 Červený Kostelec (28),

15 Nové Zámky,

10 Orlová, 8 klubo (9),

5 Brno (5),

5 Pardubice (4),

5 Píseň (6),

4 Bratislava (3),

3 Holešov (3),

po 2 Kladno, Náchod, Pelhřimov, Plzeň, Trnava, Zábok u Blatné,

po 1 membro havis 67 lokoj de la respubliko.

La grandan ciferon de la membroj en Praha ni dankas al la Klubo, kiu en sia kotizo 24 Kĉ enkasigis ankaŭ la asocian. Persone pri tio zorgis la kluba kasisto S-ro Dobeš.

La kreskon en Olomouc ni dankas al nia komitatano S-ro Kudela, kiu enkasigas la kotizojn. Kiel mi raportis en la lasta jarkunveno, montriĝis tre efika la kombino de asocia kotizo kaj abono de la Progreso.

En Ústí nad Orlicí zorgas pri Asocio tiea komitato kun S-ro Bergmann, nia komitatano kaj S-ro Vašiček, en Červený Kostelec S-ino Keyzlarová kaj F-ino Hejnová, en Košice S-ro Jos. Friedrich, en Hradec Kr. S-ro Černý, en Nové Zámky Badin kaj Bujarek, en Orlová Hanzelka, multloke kompreneble kun helpo de la ceteraj komitatanoj.

Por la jaro 1928 aliĝis ree 30 membroj el Olomouc, 10 novaj membroj el Librantice apud Hradec Králové (nova klubo), 11 membroj el Slezská Ostrava

(novaj), 6 membroj el Jaroměř (novaj realiĝoj) kaj el Brno 16 membroj.

En Rakovník estis restarigita la antaŭmilita klubo, sed disiris aŭtune kaj laŭ ĝia statuto Asocio fariĝis posedanto de kluba havaĵo (libroj, ŝranko ktp). La havaĵo ne estis transprenita, sed troviĝas en Rakovník por eventuala bezono de nova klubo.

Ĉiu membro paginta plenan kotizon rajtas ricevi senpagan libran premion. Tiuj ĉi estis la jenaj libroj: Svaz národů o esperantu, Jak byl rozřešen problém j. m. v obchodu, Collinson: Esperanto a jeho kritikové, plue esperantaj broŝuroj Devoj de la Homo kaj en 1928 esp. broŝuro pri la Paceduka konferenco en Praha 1927, kies eldonon Asocio ebligis mendinte 250 ekzemplerojn.

Regionaj kunvenoj partoprenataj de delegito de la komitato estis 2: Kolín en januaro kaj Pěrov fine de Oktobro. Okaze de la lasta, la ĝen. sekr. havis paroladojn kaj diskutojn pri Asocio en Ostrava la 29. X. (aranĝis Adamík), en Olomouc la 31. X. (aranĝis Kudela) kaj en Brno la 1. XI. (aranĝis Bednár). Vi povas konstati, ke en Olomouc la nombro de la membroj restis sur la bona nivelo, en Ostrava kaj Brno rezultas novaj aliĝoj.

Propagando.

Gazetara. Ioman bildon pri la rezultatoj de la propagando pere de gazetoj ni povas krei laŭ la eltranĉaĵoj ricevataj de la Eltranĉaĵa Oficejo en Praha, aldonante la nemultajn, kiujn ni ricevis senpere de niaj membroj. La tuta sumo de la informoj pri esperanto dum 1927 estis: Aperis 1223 (1306, 740) ĉefaj aŭ slovakaj informoj en 168 (161, 151) gazetoj de 53 (50, 44) lokoj. La ciferoj en parentezoj rilatas al jaroj 1926 kaj 1925, montrante ke iom malkreskis la nombro de informoj, sed kreskis la nombro de gazetoj kaj lokoj.

La sekvanta tabelo montras ĉe ĉiu loko, kiom da informoj en kiom da gazetoj aperis:

Ostrava	405 en 6 gazetoj,
Praha	207 en 58
Brno	174 en 15
Liberec	64 en 3 (ĉefaj!)
Plzeň	55 en 7

Hradec Králové	43 en 3
Olomouc	32 en 4
Nové Zámky	28 en 2
Nymburk	23 en 1
Český Brod	19 en 2
Frýdek	17 en 2
České Budějovice	13 en 6
Bratislava	13 en 6
Kroměříž	10 en 1

Pri la ceteraj 39 lokoj ni havas malpli ol 10 informojn; tamen ne estas troiĝo, se ni diros, ke en multaj el ili, simile kiel en la supre nomitaj, aperis certe pli granda nombro. Nur de tempo al tempo ni povas kontroli, ke ankaŭ la Eltr. Of. ne liveras ĉion.

Rubriko esperanta daŭris en Nový Lid, Brno (Petr), en Moravsko-slezský (Adamík, ĉesis en 1928), en Blaník, Benešov (Dolanský), en Nové Listy, Liberec (Košinek), en Stráž pokroku, Hradec Král. (Sklenčka), en List Říšského svazu učitelek (Šupichová). Ĉiuj instruistaj gazetoj raportis pri la Paceduka konferenco, same multaj ĵurnaloj. El ili Nár. Osvobození havis sur la unua paĝo esperantan saluton al la Konferencanoj. Pri esperanto raportas ofte katolikaj gazetoj en Praha, kaj la laboristaj en Plzeň. Ankaŭ la jubileaj aranĝoj de la Klubo Praha donis al la ĵurnaloj okazon por paroli pri esperanto ĝenerale, same la jubileo de esperanto.

Propagando per paroladoj. Diversaj samideanoj parolis, kiel ni raportis en la Kroniko Bultena. Asocio mem nenien sendis oratoron.

Ekspozicia materialo estas daŭre administrata de S-ro Šustr kaj estis pruntita al: Klubo Praha, al S-roj Sedzimir en Mor. Ostrava, Janda en Vysoké Mýto, Zamarský en Kopřivnice kaj Dolanský en Benešov.

Flugfolioj. En 1927 estis pagitaj 6.700 Esperanto-mezinárodní poŝtmarkoj uzitaj plejparte en 1926 kaj 5000 novaj ekzempleroj (5-a eldono) de tiu ĉi bonega propagandilo, verkita de S-ro Bouška, kaj ĉiam reviziata laŭ la ĵusa stato de la movado. Tiu ĉi flugfolio — mal-kara sekve de granda kvanto presata — estis vendita en pli grandaj kvantoj al Olomouc, Kolín, Jilemnice, Žamberk, Ústí, České Budějovice. Krom tio senpage disponigita al izolaj samideanoj, dezirantaj propagandi en sia loko kaj

al personoj dezirintaj informojn pri esperanto.

Broŝuro de Collinson: Esperanto kaj ĝiaj kritikantoj, ĉeflingva traduko, devus troviĝi en la mano de ĉiu samideano, ne nur kiel helpilo por rebati diversajn kontraŭdirojn, sed ĉefe kiel verko, kiu konatigas ĉiun kun scienca bazo de nia lingvo. La broŝuro estas donata kiel senpaga premio, aŭ vendata por 2.40 Kĉ.

Radio. Post longaj preparaj klopodoj el kiuj ni citu memorandumojn de Asocio, rezoluciojn de regionaj kunvenoj, rezolucion de internacia kongreso de Radio-Unio, de kongreso de ĉs. radioamatoroj, intervenoj de diversaj personoj (Šupichová, Eiselt, Pitlík), serio de artikoloj Aisberg-Ginz en Radiojournal, insistaj klopodoj de dir. Bednář pere de Radio-Klubo Brno, esperanta radiokurso estis fine elsendata el Brno. La sukceso estis unika en tiu rilato, ke venis ĉ. 1500 korespondadoj al radio-stacio Brno kaj dir. Bednář, gvidanto de la kurso. La kurso estis publikigata en la semajna gazeto de Radiojournal. Estus domaĝe, se tiu ĉi eksterordinara sukceso restus sen funda prilaboro, precipe de la adresa materialo. — La 15. XI. parolis en Praha-stacio F-ino Šupichová ĉefe pri Komenský kaj ideo de I. i. La sama parolis la 15. XII. pri D-ro Zamenhof, kreinto de esperanto. Dufoje parolis S-ro Benetka pri ĉeĥa historio.

IV. kongreso en Teplice-Sanov okazos dum Pentekosto, la 26.—28. Majo, laŭ invito de la urbestro. Preparoj bone progresas. Aliĝiloj estos almetitaj al la aprila nro de La Progreso. Por ke la kongreso havu bonan propagandan efikon, estas necese, ke multaj aliĝu kaj ke precipe ankaŭ ĉeĥaj samideanoj multnombre partoprenu malgraŭ distancoj. La banurbo per sia beleco kaj fameco mem loĝas al tio.

Paska Konferenco estis unu el plej grandaj aranĝoj, kiuj okazis en la jaroj postmilitaj en rilato al esperanto. Asocio estis reprezentita en la prepara komitato per sia prezidanto kaj ĝen. sekretario, kiu estis Konferenca kasisto. Partoprenis 427 personoj, el kiuj 122 estis fremduloj.

Protectoraton akceptis prezidanto Masaryk mem, honoraj prezidantoj es-

tis du ministroj — eksterlanda Beneš, instruada Hodža — sola traduka lingvo estis esperanto, en kiu eĉ kelkaj raportoj estis senpere prezentitaj. Ni kiuj scias kun kia malfida rideto la prepara komitato akceptis la ideon pri la rolo ludota de esperanto en la konferenco kaj scias pri la surprize bona efiko de ĉiuj aranĝoj, plej bone konscias, kian revolucion mensan la konferenco faris en la rondo de niaj pedagogoj. Ĉu ni sufiĉe eluzis tion, estas alia demando. Estus tre bone utilinta, se ni havus ekz. ĉe Asocio fakon de instruistoj esperantistoj. La ekzemplo de Praha-konferenco estos sekvata en kelkaj venontaj konferencoj internaciaj. Ankaŭ tie esperanto estos sola traduka lingvo, kaj venos tiel direkte en la orelojn kaj antaŭ okulojn de homoj, kiuj neniam venis en niajn nur esperantajn kongresojn kaj kunvenojn. Estas nia devo danki ankoraŭfoje al ĉiuj, kiuj ebligis tiun konferencon, precipe al Prof. Bovet, Dro Privat, iniciatintoj kaj ĉefaj faktoroj de la konferenco, kaj al Prahaj grupoj: Klubo, Rondeto kaj Verda Stelo, kiuj finance helpis per notindaj sumoj.

Oficiala instruado.

Altlerneja. Lektoratoj de esperanto estas en Teknika Lernejo, Praha (S-ro Pitlík) kaj en Minista Lernejo en Příbram (Dr. Šilha). En Praha Teknika Lernejo krom ĝisaj prelegoj pri esperanto S-ro Pitlík en 1927—8 prelegis pri Esperantista movado en la historio de internacia helpa lingvo artefarita.

Duaĝrada. Mankas informoj.

Komercaj Akademioj. En Hradec Králové prof. Smeták havas 12 lernantojn, en Bratislava prof. Jukl 26 lernantojn.

Blinduloj. Deviga instruado okazis en Instituto Hradčany (prof. Stejskal) kaj Instituto Deyl (S-ro Lederer).

Ŝtataj ekzamenoj. Ĝis nun faris ŝtatan ekzamenon 38 personoj, ĉe la ĉeĥa aŭ slovakaj komisionoj: En Praha (ekzamena komisario dir. Eiselt) 29 p., en Brno ĉe Prof. Kroužil 8 p. kaj en Bratislava ĉe Dro Kamaryt 1 p. Nur malmultaj el ili fakte instruas kaj la nombro de kandidatoj en la lastaj jaroj ne estas kontentiga. La kaŭzojn de tio Asocio vo-

las nun esplori kaj forigi. Ĝia propono pri Ekzamena Kaso, el kiu estus almenaŭ parte pagataj la elspezoj de la kandidatoj volas helpi, ke multaj instruistoj faru la ekzamenon.

Neoficiala instruado.

Estas longa vico de la personoj, kiuj dediĉis sian tempoj kaj energion al la instruado en publikaj kursoj. Ĝis ĉiam nia deziro, ke kompletaj informoj pri tio aperadu en la Bulteno. Sed spite tio, ke ni ofte devis skribi al la koncernaj lokoj, ni sukcesis kolekti sole nekompletajn ciferojn: 700 personoj en 37 kursoj de 24 lokoj estis instruitaj dum la jaro 1927. Alfluo de novaj membroj el tiuj ĉi kursoj estas minimuma. Ankaŭ en tiu rilato la administrado de ĈAE devus sin aranĝi pli energie.

Partopreno en la internacia movado.

Konstanta Reprezentantaro kunvenis en 1927 dufoje, en Praha kaj en Danzig. La Praha-kunveno okazis dum la Paceduka konferenco kaj estis organizita de Asocio. Ĉeestis ĝin gvidantoj de la movado el 15 landoj. La kunveno de Danzig ne partoprenis nia Asocio, kvankam ĉeestis niaj membroj kaj eĉ komitatano. Ni ne povis delegi iun el ili ĉar ili ne informis nin pri sia partopreno.

Oficejo de ĈAE.

Kvankam en la budĝeto ni rezervis sumon por paĝi korespondanton, ni ne havis lin. Krom korespondaĵoj, kiuj rilatis la ekspozician fakon kaj estis plenumitaj de S-ro Šustr, la cetera korespondaĵo estis plenumita de ĝenerala sekretario. Alvenis 1173, foriris 807 korespondaĵoj. Tiuj ĉi konsistis ĉefe el informado pri esperanto kaj el rilatoj kun kluboj.

Ĝenerale dirite, la situacio de Asocio en iuj punktoj restis kontentiga. Sed en diversaj aliaj (nombro de la membroj, iniciato propaganda ks.) ni ne progresis. Pro tio la komitato opinias, ke estas dezirinde pli grandigi la nombron de la Prahaj membroj de la komitato, kaj proponi al vi novajn kandidatojn, kiuj esprimis sian pretecon kunlabori. Estos necese pli intense varbi membrojn, kunlaborantojn de la gazetara servo, aranĝi propagandon en lo-

koj sen movado, atenti pri propagando en diversaj fakoj: instruistoj, poŝtistoj, fervojistoj, junuloj k. s. Sed ĉefe ni okupu nin per demando de instruado de esperanto, kaj de ŝtate ekzamenitaj instruistoj. Da taskoj estas sufiĉe — kaj multaj el ili estas plenumblaj — se la venontaj komitatanoj dividos inter si la laboron kaj se ili trovos apogon ĉe la membroj kaj ĉiuj ĉs. samideanoj.

Hromada Rud.

GVIDANTARO DE ĈAE 1928 KOMITATO

Membroj:

1. Bergmann Max, obchodník, *Ústí n. Orlicí.*
2. Čemus Lad., úředník, *Žižkov*, Na Balkáně 1360.
3. Eiselt Jos., vlád. rada, *Vinohrady*, Slezská 58.
4. Friedrich Jos., rada st. drah, *Košice*, Jarná 20.
5. Hromada Rud., přednosta, *Praha VII.*, Sochařská 333.
6. Dr. Kamaryt Stan., prof. reálky, *Bratislava*, Tělocvičná, 3
7. Keyzlarová Berta, choť obchodníka, *Červený Kostelec*, Sokolská, 7
8. Kraus Vojtěch, ředitel, *Praha I.*, ul. Karoliny Světlé, 21.
9. Kudela Ant., vrchní soudní oficiál, *Olomouc*, Horní novosadská, 56.
10. Pítlik Aug., adm. tajemník, *Praha II.*, Křemencová, 17.
11. Slavík Frant., uč. úředník, *Bubeneč*, Uralské nám. 447.
12. Šupichová Julie, odb. učitelka, *Praha II.*, Malá Štěpánská, 6.

Vicmembroj:

1. Dlouhá Sidonie, úř. st. drah, *Praha 15*, Wilsonovo nádraží.
2. Kryl Frant., *Mor. Ostrava-Přivoz*, Výravova 29.
3. Dr. Parma Č., lékař, *Praha III.*, Šeříkova 7.
5. Sklenčka Otto, účetní Živnobanky, *Hradec Králové*, Čelakovského, 623.
5. Šustr Jar., obchodník, *Praha I.*, Dlouhá, 53
6. Vondruška J., bank. úř. *Brno*, Falkensteinerova 9.

KONTROLA KOMISIONO.

Membroj:

1. Bujarek Václav, pošt. úředník, *Nové Zámky.*
2. Hanzelka Frant., báňský úř., *Lazy* 6.
3. Hoffmannová Fr., choť obchodníka, *Jaroměř*, 56, villa u zastávky.
4. Novák Frant., majitel závodu hodinářského, *Praha I.*, Malé nám., 10.
5. Weisskopff Mořic, obchodník, *Praha I.*, Národní, 37.

Vicmembroj:

1. Hermoch Stan., obchodník, *Kolín V.*, Jiráskovo nám., 13.
2. Holánková Anežka, odb. učitelka, *Vyškov.*
3. Růžička Frant., profesor, *Holešov.*

FINANCOJ DE ĈAE EN 1927

Perdo-gajna konto:			
Debeto:			
Kto Kotizoj: Al K. R. pagita		282.—	
Kto Administraĵoj:			
afranko	786·20		
ĉekkonto	31·17		
papero ktp.	97·20		
	<u>914·57</u>		
vojaĝoj	454.—	1.368·58	
Bulteno		2.024·86	
Kto Propagando:			
11.700 Pojítka	720·16		
Collinson, resto	625·64		
Gazetara servo	433·92		
Presajoj disdonitaj	78·34	1.858·06	
Kto Inventario:			
10% amortizo		103·80	
Aktiva diferenco		1.202·64	
		<u>Sumo</u>	6.839·94
Kredito:			
Kto Kotizoj:			
1924—5	40.—		
1926	696.—		
1927	5.000.—	5.736.—	
Kto Administraĵoj:			
rekompensita afranko		367·40	
Kto Propagando:			
vendita: 3300 Pojítko	242.—		
229 Collinson	294.—		
1 Svaz	5.—	541·10	
Kto Vendeblaĵoj:			
profito		103·82	
Kto Diversa:			
rentumo poŝta ĉekoficejo	12·11		
donaco: Olomouc	50.—		
Ostrava	29·50	79·50	91·61
		<u>Sumo</u>	6.839·93

Bilanca konto al 31/12 1927.

Aktivoj:			
Kaso	875·49		
Poŝta Ĉekkonto	3.037·60		
Urba ŝparkaso	2.426·99	6.340·08	
Provizo de vendeblaĵoj		456·28	
Inventario (skribmaŝino k. a.)		935.—	
Bonhavo:			
Ing. Kohn	4.—		
E. K. Trutnov	20.—		
Progreso	1.750.—	1.774.—	
		<u>Sumo</u>	9.505·36

Pasivoj:

Kotizoj antaŭpagitaj por 1928	293.—
Profito de Bratislava kongreso	580·20
Neta havaĵo 31/12 1927	8.632·16
	<u>Sumo</u>
	9.505·36
Asocia kapitalo.	
Neta havaĵo 31/12 1926	7.429·52
Neta havaĵo 31/12 1927	8.632·16
Kresko dum 1927 (v. kton perdo-gajnan)	1.202·64

GENERALA KUNVENO DE ĈAE.

La 1. Aprilo 1928 en kafejo Urban, Václavské nám. 33. Ĉeestis 33 p. el Praha, Hradec Králové kaj Červený Kostelec. — Salutleterojn sendis: Grauerová Přerov, prof. Jukl Bratislava, Krysta Čes. Těšín, Ant. Kudela Olomouc, Pytloun Bakov kaj Rosa Bratislava.

Je la 10.30 prez. Eiselt malfermas la kunidon per saluto al la ĉeestantoj kaj rememoras la membrojn mortintajn en 1927: Jos. Popper el Čadca, Halada Chotěboř kaj Bohuslav Praha.

S-ro Skleněka per sinceraj vortoj mencias la 70 jarojn de la asocia prezidanto S-ro direktoro Josef Eiselt, liajn meritojn pri la movado kaj Asocio, ĝratulas al li en la nomo de la ĉeestantoj kaj informas, ke la komitato de ĈAE decidis prezenti al la ĝenerala kunveno la proponon, ke S-ro dir. Eiselt estu nomita honora membro de ĈAE. Per longa aplaŭdo la kunveno akceptas tiun ĉi elekton de la unua honora membro de ĈAE. S-ro Eiselt sincere dankas

Laŭ deziro de la kunveno, la protokolo de la lastjara kunveno, ĉar presita en Bulteno, ne estis legita.

S-ro Hromada prezentas raporton pri la jaro 1927 (vidu aliloke).

La sama legas raporton de D-ro Kamaryt; direktoro de la Scienca Sekcio de ĈAE (vidu aliloke).

S-ro Louda parolas pri bezono de ŝtate ekzamenitaj instruistoj. Transdonita al la venonta komitato.

S-ro Bloch deziras klarigon koncerne la vojaĝon de S-ro Ohlsson en ĈSR. Post debato transdonita al la komitato.

S-ro Skleněka atentigas pri la grandega adresara materialo akirita per la radiokurso en Brno kaj esprimas deziron, ke ĈAE., post kiam S-ro Bednář ne plu bezonos la adresojn, klopodu ilin akiri kaj propaĝande prilabori.

S-ro Pitlík informas, ke li laboris en ga-

zefara servo pere de profesia pres-agentejo.

La raporto de la ĝen. sekretario estis aprobata, same la raporto de D-ro Kamaryt.

S-ro Hromada prezentas raporton pri financoj en 1927. La raporto montras pliĝrandiĝon de la asocia havaĵo per 1.202.64 Kč al 8.632.16 Kč. Enspezoj estis 6.839.93, elspezoj 5.637.29 (Detala raporto aliloke).

S-ro Novák deklaras, ke revizianta la financojn, li trovis ĉion en ordo kaj laŭ lia propono la malnova komitato ricevas senŝarĝiĝon.

La financa raporto estas aprobata kaj la prezidanto dankas al S-ro Hromada por plenumado de ambaŭ funkcioj.

S-ro Šustr raportas pri la ekspozicia materialo, kiun li administras kaj kiun li pruntis al 5 lokoj. Li plendas, ke iuj pruntintoj ne resendis la materialon en la ordo, en kiu ili ricevis ĝin. La riĉa materialo estas aranĝita en 5 grupoj. La plej granda estas la grupo nro 1., enhavanta preskaŭ 2000 objektojn, en ili multaj unikaj, kaj estas pruntata nur ĉe specialaj okazoj. Li faras alvokon, ke la membroj memoru pri tio, ke la ceteraj kolektoj estas kompletigitaj (sekve de tio ke ĉiun objekton oni bezonas havi kvinoble) kaj ke oni donacu materialon (gazetojn, presaĵojn ktp.). Grandan intereson dum ekspozicioj vekas esp. gazetoj kun informoj pri Ĉeĥoslovakio kaj li deziras havi pli da ili en siaj kolektoj. La prezidanto dankas S-ro Šustr por la perfekta plenumado de tiu ĉi ne multe agrabla laboro, S-ro Kraus subtenas la peton de S-ro Šustr pri plua materialo kaj samtempe promesas donaci interesajn objektojn el sia kolekto.

S-ro Hromada parolante pri la budĝeto por 1928 diras, ke la komitato decidis doni ankoraŭfoje la ciferon de 1000 membroj kiel celon, kio donus 16.000 Kč (en tio 2000 Kč kiel kotizo al K. R.). El tiuj 14.000 Kč la duono 7.000 Kč estu donitaj por propaĝando; administraj aferoj, varbado kaj informado de membroj, vojaĝoj k. a. ankaŭ 7.000 Kč.

S-ro Pitlík deziras, ke ĉiam almenaŭ duono de la enspezoj estu dediĉata por propaĝando.

S-ro Kraus proponas, ke la kotizo resp. ĝia parto ne estu redonata en formo de diversaj premioj.

S-ro Hromada klarigas, ke premiojn enkondukis siatempe ĝenerala kunveno por plifaciligi varbadon de novaj membroj, kaj ke ĉiuj niaj premioj estas jam pagitaj en la pasintaj jaroj, escepte la nova premio (broŝuro pri Paceduka konferenco), sed tiun ni jam firme mendis.

S-ro Bloch proponas, ke anstataŭ libra pre-

mio ĈAE donu propaĝandan materialon, kiu utilis precipe al izoluloj. S-ro Hromada klarigas, ke jam nun Asocio donas senpage propaĝandan materialon al personoj, kiuj deziras ion entrepreni en sia loko.

S-ro Sklenčka proponas, ke ĈAE simple aldonu al la ĝisnunaj premioj kolekton de propaĝandiloj. La membroj ne indikantaj iun premion montras, ke ili ne deziras uzi sian rajton. Tion cetere multaj jam faras, ankaŭ ĉe UEA. Aprobata, same la tuta budĝeto.

S-ro Hromada legas la liston de kandidatoj, starigitan de la komitato. En ĝi oni faras ŝanĝon kaj unuanime estas akceptita la listo, publikigita sur alia loko.

La nova komitato enhavas inter 12 lokoj 7 membrojn el Praha, kio montriĝis necesa, por ke la kunsidoj estu decidkapablaj. Plie, du novaj membroj eniras, S-ro Cemus kaj Slavík, kiuj promesis preni sur sin parton de la laboroj de ĝen. sekr. kaj kasisto. La kunveno ankaŭ ĝoje salutis, ke du malnovaj membroj akceptis la funkcion: F-ino Supichová kaj S-ro direktoro Kraus. S-ro Sklenčka kaj F-ino Dlouhá volonte konsentis transiri inter la vickomitatanojn. Al ĈAE-anoj en Slezská Ostrava kaj Brno estis rezervitaj lokoj por vickomitatoj elektotaj de ili. — En la Kontrola komisiono restas du Prahaj membroj S-roj Novák kaj Weisskopf.

Liberaĵoj proponoj:

S-ro Pitlík raportas pri la propono de la komitato, laŭ kiu ĈAE fondu Ekzamenan fondon, rezervon, kapitalon, el kiu estu subtenataj instruistoj, sukcese farintaj ŝtatan ekzamenon de esperanto, laŭ la ekzemplo de simila aranĝo ĉe GEL. La kunveno aprobas dediĉi 500 Kč por tiu celo el Asocia kapitalo kaj fari publikan alvokon, ke la membroj per donacoj plialtigu tiun sumon.

S-ro Jar. Novák motivas sian proponon pri fondo de Junulara sekcio, kies celo estus: 1. zorgi pri listo de ĉiuj lernejoj, en kiuj esperanto estas instruata, havi rilatojn kun la kursestoj pri la partopreno kaj rezulto de la instruado, 2. ebligi al la lernantoj rilaton kun lernantoj de aliaj landoj, 3. rilati kun la lernantoj ankaŭ post finiĝo de la instruado, ĝis la tempo en kiu ili povos fariĝi membroj de ĈAE, 4. prepari fondon de Junulara Sekcio de ĈAE.

Post debato partoprenata de S-roj Sklenčka, F-ino Supichová, S-ro Kraus favore al la propono, tiu ĉi estas akceptita kaj S-ro Novák Jar. estas komisiita gvidi la aferojn. Por havi kontakton li estos invitata al ĉiu komitata kunveno.

S-ro Sklenčka rememoras, ke kun la jubileo de UEA. festas dudek jarojn de sia delegiteco kaj de sia laboro por UEA. la ĉeestanta komitatano de CAE S-ro direktoro Vojtěch Kraus; li diras vortojn de danko kaj admiro por tiu laboro kaj sinceran gratulon por la plua, kun aplaŭda konsento de la ĉeestantoj.

S-ro Hromada raportas pri la deziroj venintaj al la komitato, ke dum la ekspozicio de Brno estu aranĝita kunveno de esperantistoj por trakti pri aktualaj aferoj rilatantaj ĉefajn esperantistojn kaj Asocion. S-ro Sklenčka subtenas la ideon kaj la kunveno decidis trakti kun E. Klubo Brno pri tia kunveno komence de julio.

S-ro Bloch deziras, ke Asocio zorgu, ke estu daŭrigata la aranĝado de regionaj kunvenoj, kiuj — laŭ liaj spertoj ekz. la orientbohemiaj — havis nedisputeble utilan influon je la movado kaj scio de la lingvo. S-ro Sklenčka subtenas la ideon, sed atentigas, ke la afero dependas de bonvola laborema samideano, kiu prenas sur sin la preparajn laborojn lokajn kaj invitajn. S-ro Pitlík informas, ke E. Klubo Praha projektas tiajn kunvenojn en ĉirkaŭaĵo de Praha.

S-ro Sklenčka konstatas neĝrandan nombron da ĉeestantoj, klarigas ĝin parte per la fakto, ke ĝrandaj kunvenoj estas tro kutimaj en Praha kaj sekve neplu allogaj. Li rekomendas, ke venonte la ĝeneralaj kunvenoj de CAE. okazu en diversaj lokoj de la respubliko, kie ili allogus ĝrandnombran ĉeestantaron el la ĉirkaŭaĵo. S-ro Bloch rekomendas, ke la raportoj kaj debatoj en la ĝen. kunvenoj estu en esperanto, kio instigus al partopreno multajn membrojn izolulojn, kiuj ne havas okazon ofte aŭdi esperanton parolatan. Favore por la idio debatas Pitlík, Hromada, Sklenčka.

S-ro Bloch kaj F-ino Nývltová A. parolas pri mankoj en la ĝvidado de Asocio. Unue S-ro Bloch atentigas, ke E. Klubo Kolín plendis pri tio, ke Asocio ne sendis delegiton nek saluton al ilia ekspozicio en junio 1927. Plie, ke Bulteno ne enhavis raportojn pri la aĝado de E. Klubo Praha kaj ke iuj membroj ne ricevis Bultenon.

S-ro Hromada atentigas, ke eĉ en ĝrandaj societoj havantaj oficistojn okazas eraroj, tiom pli ili estis eblaj ĉe ni dum 1927, kiam de unu persono dependis ĉia oficeja laboro asocia. Sufiĉis tuj atentigi, por esti kontentigita kaj ne atendi tutan jaron por la ĝen. kunveno. Koncerne la raportojn pri la aĝado de kluboj li diras, ke estas morala devo kaj propra inte-

reso de la kluboj sendadi informojn pri sia aĝado por la Bulteno. Spite tio, ni skribe petas ilin de kluboj longe silentintaj kaj en kazo de Praha-klubo ili estis petitaj ĝuste de S-ro Bloch. S-ro H. diras, ke pro manko de tempo li ne povas plenumi postulon, ke li mem regule vizitu la klubajn kunvenojn.

Post tio, la kunveno estis finita je la 14. horo.

Protokolis:

A. Tarantíková.

Fr. Slavík.

SCIENCA SEKCIO DE CAE EN 1927.

La Sekcio dediĉis sian atenton al la esperantaj resumoj en sciencaj gazetoj ĉefoslovakaj, sed en 1927 sensukcese. — La artikolo en „Esperanto“: Pri metodo de ellaborado de regulaciaj planoj de urboj, kies aŭtoro estas docento Zákrejs, membro de nia Honora Komitato, trovis eĥon sole en Kalifornio, de kie skribis S-ro Postníkov en Berkeley. — Direktoro de la sekcio zorgis, kun kontentiga rezulto, ke ISAE havu el ĈSR indan nombron da membroj. Por faciligi la varbadon ni eldonis en decembro ciklostilitajn cikulerojn, kiuj rapidigos la laboron. — Ni donadis fakajn konsilojn pri teknikaj terminoj. Atentinda estas la kunlaboro en meritplena traduko de fervojaj dokumentoj, farata de S-ro insp. Řebíček en Olomouc. — N. D. Nemseči en Tabriz ricevis de ni fotografaĵojn, kiujn li danke kvitis. — 23. III. 28.

Dr. Stan. Kamaryt,
Direktoro de Scienca Sekcio.

I. KOMITATA KUNVENO DE CAE jaŭde la 12. IV. 1928.

Malfermo 20.15 h. Ĉeestas: Eiselt, Hromada, Kraus, Pitlík, Slavík, Supichová; Sustr; Novák Jar. — Pri neĉesto informis Bergmann kaj Dlouhá. — Protokolus Slavík.

Divido de funkcioj. Al ĉiuj komitatanoj elektitaj en la ĝen. kunveno estis sendita informo letero pri tio, kun peto, sciigi al ni sian konsenton. Mankas ankoraŭ kelkaj respondoj.

Unuanime estis elektita: S-ro Eiselt kiel prezidanto; D-ro Kamaryt kiel vicprezidanto; S-ro Hromada kiel ĝenerala sekretario; S-ro Slavík kiel unua sekretario; S-ro Ĉemus kiel dua sekretario; S-ro Kraus kiel kasisto. La oficejaj laboroj de CAE estos do dividitaj inter kvar personoj kaj ni esperas, ke post plenumo de prokrastitaj aferoj ĉio povos esti plenumata akurate.

Alvenintaj leteroj: S-ro Smith el Haĝo petas pri rekomendo kaj atesto pri liaj paroladoj. Transdonita per S-ro Pitlík al E. K. Praha. —

Kunveno en Brno. E. Klubo Brno informas, ke ĝi decidis aranĝi la 7.—8. Julio, okaze de la jubilea tutŝtata ekspozicio kunvenon de Moraviaj kaj Sileziaj esperantistoj kaj sciigas pro-

vizoran programon: 7. kaj 8. matene kunsidoj, 7. posttgm. vizito al la ekspozicio, vespere amuza kunveno kun bela programo, la 8. posttgm. ekskursoj al ĉirkaŭaĵo. — Post defala debato estis decidite, ke ĈAE uzu la okazon kaj aranĝu Konferencon de ĉefaj esperantistoj, siaj membroj aŭ ne, kun la celo: preparoli kun ĉiuj laborantoj diverslokaj kaj diversfakaj prepa-rojn por vasta propaĝando aŭtuna. Estis starigita la jena programo, event. kompletigota:

1. „Instruado de esp. en lernejoj“, kunlabore kun ĉefaj reprezentantoj de TAGE—Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esp. kaj Esp. sekcio de ĉs. Profesoroj (ŝtataj ekzamenoj de esperanto, ŝtate ekzamenitaj instruistoj, oficiala instruado, zorgo pri esp. lernantoj absolvintaj lernejojn k. s.).

2. „Esperanto kaj turismo“, kunlabore kun UEA-delegitoj.

3. „Esperanto inter poŝtistoj kaj fervojistoj“, kunlabore kun ĉs. membroj de llepto kaj IAEF.

4. „Esperanto kaj komerco“, kunlabore kun la samnoma societo esp.

5. Eventuale esperanto kaj aliaj fakoj, kiel ekz. skoltaj; estis decidite skribi al prof. Stejskal kaj aliaj skoltaj esp.

Ekspozicio Brno. E. Klubo Brno sciigis, ke esperanta fako ne estas aranĝebla pro manko de loko. ĈAE skribos direkte al la ekspozicia komitato kaj informos ĝin samtempe pri la projektata esperanto-konferenco. S-ro Neužil informas, ke li estis komisiita aranĝi esperantan fakon en la fako de lerneja instruado, kaj petas helpon en diversaj punktoj. ĈAE donos adresojn de instruistoj esp., de ŝtate ekzamenitaj instruistoj, k. a.

Faka propaĝando. La komitato detale parolis pri maniero de la estonta propaĝando. Ekzistas urboj, kie la ĝisnuna propaĝando, direktata al la diversklasa kaj diversfaka publiko, donas ja rezultojn bonajn, sed ne sufiĉe respondantajn al niaj deziroj. Oni akcentis bezonon dediĉi pli da atento al propaĝando, pere de fakuloj, en diversaj fakoj kiel: instruistoj kaj lernantoj, komercistoj kaj komercaj okupatoj, poŝtistoj kaj fervojistoj. La detaloj estos studitaj kun helpo de niaj membroj el ĉi tiuj medioj. Multon oni povos interkonsenti dum la kongreso en Teplíce-Sanov. La kunveno en Brno havas celon kunigi kiel eble plej multe da laborantoj kaj interkonsenti pri la agadmaniero.

Fermo de la kunveno je la 22. horo. — Venonta kunsido la 19. IV.

Fr. Slavík.

2. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

jaŭde la 19. IV. 1928 en Odborový dům.

Malfermo 20.15. — Ĉeestis Eiselt, Hromada, Kraus, Slavík, Šupichová; Dlouhá, Dr. Parma, Šustr; Novák Jar. — Pri neĉeesto informis Ĉemus, Ditlík, Weisskopf, kaj eksterprahaj membroj. — Protokolis Slavík. — Leterojn al la kunsido sendis Dr. Kamaryt, Kudela kaj Skleněčka.

S-ro Skleněčka letere salutas la aranĝon de

ĉirkuleroj, per kiuj la komitatanoj ekster-Prahaj estas informataj pri la traktado de la kunsido. Li ĝojas, ke la freŝa vento, kiu blavis dum la jarkunveno ne estis fluzio, sed io reala; li gratulas pro divido de la funkcioj kaj esprimas fidon, ke la nova aranĝo manifestigos baldaŭ per pozitivaj rezultoj de la asocio laboro."

Kunveno de Brno. S-ro Kudela dubas pri taŭĝeco de la dato 7—8 Julio kaj preferus la du antaŭajn festotagojn, la 5.—6. Julio. La sabato 7. VII. estas labortago kaj multaj oficistoj malfacile ricevus libertempon por tiu tago, ĉar ĝi sekvas du festotagojn. Interkonsentite, ke pri la dato ni traktos kun E. K. Brno.

Ekspozicio Brno. Se nia interveno ĉe la ekspozicia komitato estos sensukcesa, S-ro Skleněčka proponas interkonsenti kun Nový Lid. D-ro Kamaryt bedaŭras, ke la loka grupo ne pli frue prizorgis la aferon kaj rekomendas zorgi, ke almenaŭ kolekto de ĉs.-esp. lernolibroj (plena) estu ekspoziciata. — Plie, esperanto troviĝos en lerneja ekspozicio, fako esperanto, aranĝata de S-ro Neužil, kaj en pacifista fako.

S-ro Skleněčka kaj Kudela proponas zorgi pri esperanta reklamilo ekspozicia, kiu estus disvastigita tra la mondo pere de esp. gazetoj. Farota.

Eldono de slovaka ŝlosilo. D-ro Kamaryt proponas, ke la profito de la Bratislava kongreso estu uzita por eldono de slovaka ŝlosilo. Siatempo Asocio ricevis proponojn, ke por la mono ni eldonu slovakon tekston de la flugfolio Pojtko. Post debato la kunsido rekomendas, ke la komitatanoj konsideru eldonon de la slovaka teksto de iama flugfolio „Esperanto sur unu folio“, kiu enhavus ne nur fundamentojn de gramatiko kaj informojn pri la movado, sed ankaŭ fundamentan vortareton, kiu plej efikas propaĝande.

Enketo de Dro Poncet pri Libertempejoj kaj Liberaeraj institucioj: Dir. Kraus informas, ke pri la afero li jam traktis kun direktoro de Ĉs. Ruĝa Kruco, kiu promesis respondi la enketan demandaron.

Instruistoj en Saksujo. Ĵus alvenis broŝuro enhavanta detalan liston de esperanto-instruistoj (profesiaj) en Saksujo kaj kune liston de lernejoj, kie esp-o estas instruata devige, nedevige aŭ kurse. Tiu admirinda raporto povas esti instigilo por niaj instruistoj kaj F-ino Šupichová faros pri tio artikolon por Bulteno.

Ŝtataj ekzamenoj. Ekzamena komisario en Brno, Ing. V. Kroužil informas, ke la 17. IV. faris ĉe li sukcesan ekzamenon instruistoj: L.

ĈAE invitas vin partopreni al
IV. Ĉeĥoslovaka kongreso

Pentekoste (26-28. Majo)

en Teplice-Ŝanov.

Uzu la almetitan aliĝilon kaj pagilon! Ne prokrastu la aliĝon! Venu certe al la bela banurbo Teplice-Ŝanov.

Se vi volas agrable loĝi dum la kongreso, ne prokrastu vian aliĝon, ĉar pli poste ne estos eble ricevi konvenajn ĉambrojn!

Sřřechová kaj Jar. Grodl en Bystřice n. Pern. Depost 1923 ekzameniĝis 11 kandidatoj en Brno. — Ekz. kom. en Praha, dir. Eiselt informas, ke en aprilo faris ekzamenon S-ro Slaviček Karel, instruisto en Sázava n. S. Depost 1921 ekzameniĝis en Praha 30 kandidatoj. Kune kun 1 en Bratislava la sumo estas 42 ŝtate ekzamenitaj ĉeĥaj kaj slovakaj instruistoj.

Propono de Ing. Novák, Plzeň koncernanta la Elektrajn Entreprenojn de Praha estis transprenita de dir. Kraus por provi la efektivecon.

Dekretoj pri instruado. Estos starigita kiel eble plej kompleta listo de la dekretoj oficialaj pri instruado de esp-o, favoraj aŭ ne.

IV. Kongreso. Aliĝiloj estas presitaj, kaj aldonotaj al Progreso. Kotizo 20 Kč, ĝis 10. Majo 16 Kč. S-ro Hromada legas laŭvorte leteron senditan al LKK, post kiam montriĝis, ke LKK eldonis la aliĝilojn antaŭ ricevo de niaj korektoj kaj modifoj, kaj li legas ankaŭ laŭvorte la respondon de prof. Murath, prez. de L. K. K. Letero de ĝen. sekr. plene aprobita. — Detale preparolita nia propono pri temaro kongresa, sendota al GEL.

S-ro Skleněka informas, ke S-ro Hans Jakob, direktoro de UEA promesis certe partopreni la ĉeĥoslovakon kongreson.

Peto de E. Klubo Praha, ke Asocio parte pagu ĝiajn elspezojn kun la jubileaj aranĝoj, ĉar ili efikas propagande eĉ ekster Praha, estis debatita kaj la kunsido decidis per ĉiuj voĉoj speciale danki al Praha-klubo por la farita laboro, kiu per sia signifo transiris limojn de loka entrepreno. La kunsido nur bedaŭras, konsiderante la financon rezervon de Asocio, kiu precize egalas al la Kluba kaj atentante la vastan laborkampon de Asocio, ke ĝi ne povas esprimi sian rekonon ankaŭ per la petata sumo 1000 Kč.

Fermo de la kunveno je 22.15.

Slavík.

Kroje. Esperantisté, páni, kteří pojedou na sjezd do Antverp, mají národní kroj a tančí Besedu, se žádají, aby to sdělili (zároveň s udáním, jaký kroj budou mít) na adresu Ančič Nývltová, Praha II., Sokolská 15. Z Prahy pojedou skupina dam s národními kroji.

MOVADO EN ĈSR.

Praha. Esperantista Klubo en Praha efektivegis belan ideon aranĝante la unuan vendredon ĉiumonate programan vesperon. La 6. Jan. S-ro Sustr parolis pri Egiptujo kun akompano de lumbildoj. Ĉeestis 29 membroj kaj 18 gastoj, entute 47 personoj. — La 3. Febr. S-ro Sustr parolis, kun lumbildoj, pri Kalifornio. Ĉeestis 50 p. el ili 31 membroj. — La 2. Marto denove S-ro Sustr parolis pri Japanujo sur bazo de la materialo ricevita de siaj japanaj korespondantoj. Estis montritaj fragmentoj el la literaturo (Echtner, Richterová), naciaj kantoj (Rousková). La vespero estis malfermita per japana kaj ĉeĥoslovakaj himnoj, partoprenis ĝin (ĝis la fino) reprezentanto de la japana ambasadoro en Praha S-ro Nagata kun edzino, kiu poste sendis al la klubo leteron dankante por la aranĝo kaj por fotografajoj. Tiuj ĉi estis publikigitaj en 3 ilustritaj gazetoj de Praha.

La 30. III. Miss Martha Rooth el USA parolis en la klubo pri „Esperanto en la servo de la paco“. La parolado estis riĉa dokumentaro pri siaj spertoj pri esperantismo dum siaj vojaĝoj tra la mondo. Miss Rooth estis akceptita de prezidanto Masaryk, kiu kun ŝi parolis ankaŭ pri esperanto. La 4. Apr. Miss Rooth parolis en Verda Stelo kaj la 13. Apr. antaŭ vasta publiko de pacaj societoj de Praha en ejo de filozofia fakultato de Praha-universitato.

Mall. laŭ rap. de A. T.

Pardubice. Esperantista klubo „Dro Schulhof“ havis la 1. Marto 1928 sian regulan ĝen. kunveno, en kiu estis elektitaj sekvantaj funkcianoj: Prezidantino s-ino A. Petrová, vicprezidanto s-ro Ing. L. Berger, kasistino f-ino A. Kordová, sekretario s-ro A. Jandík, 2. sekretariino f-ino A. Michalová, bibliotekistino f-ino E. Kratochvílová, arkivistino f-ino A. Boušková, revisorj s-ino R. Veverková kaj s-ro J. Vosáhlo. Ĉiu korespondado estu de nun sendata al: A. Jandík, Pardubice, na Haldě. Oni konstatis en la urbo grandan interesecon por nia lingvo, vekitan per nia pieta vespero por honorigo de nia fondinto kaj pridiskutis la problemon kiel ekkapti tiun ĉi favoran cirkonstancon por disvastiĝo de Esperanto ĉe ni.

Prostějov. Esp. Klubo aranĝas regulajn kunvenojn, kiujn vizitas krom kelkaj malnovaj membroj ankaŭ junaj idealaj pioniroj de nia kara lingvo. La kunvenoj okazas ĉiun duan kaj kvaran dimanĉon en monato je la 3 h. posttagmeze en malgranda restoracio de loka stacidomo. Post kelkaj kunvenoj, en kiuj ni preparolis novajn informojn el esperanta movado, sekvis la 11. Marto interesa parolado kun lumbildoj de nia ŝatata f-ino M. Havránková pri ŝia vojaĝo tra Hispanujo. La 25. an marton parolis s-ro Heikenwälder pri kaŭzoj de ĉina nacia movado. Aliaj paroladoj sekvos.

Fr. H.

Přerov. En la ĝen. kunveno la 28. II. estis elektita: prez. S-ino A. Grauerová; vicprez. prof. Fr. Pittner; sekr. Ad. Malík; kas. insp. Al. Čásek; plue: E. Chmelařová, Marie kaj Božena Ludiková, F. Talpa, Ed. Zatloukal, ing. Liegert, Al. Kabelík, K. Kluger. En 1927 la klubo havis 47 membrojn, estis aranĝitaj ekskursoj, partoprenata la Danziga kongreso, aranĝita regiona kunveno moravia la 30. X. kun vizito al la muzeo de Komenský, kursoj vesperaj kaj vico da aliaj entreprenoj. Propaganda kesteto por informi la membrojn kaj la publikon troviĝas en Komenského třída. Sur la l. perono de la stacidomo pendas informa tabulo. La kluba biblioteko kreskis en 1927 je 30 libroj kaj enhavas nun 80 librojn. Konversaciaj kunvenoj klubaj okazas ĉiujauĉe (19—20 horo) en Obchodní škola.

Bratislava. Propagandan prezentadon aranĝis la 17 an de marto 1928 nove fondita Esperantista propaganda rondo en la Arbareta kafejo en Petržalka. La programo estis diverslingva (esperanta, ĉeĥoslovaka, hungara, germana) kaj plene sukcesis. La ejo estis plena, kaj la dancado sekvinta post la programo daŭris ĝis la sesa matena.

Znojmo. Ĉe „Městský osvětový sbor“ ĵus estis finita kurso, gvidata de instr. S-ro Virgl kaj partoprenata, komence de 13, poste de 7 studentoj kaj laboristoj.

Miss Martha L. Root parolis en Bratislava la 19-an de aprilo pri Universala edukado por la mondopaco. Paroladon en halo de baptista unuiĝo Bratrská jednota partoprenis anoj de baptista, metodista kaj ĉeĥoslovaka eklezioj, plejparte neesperantista publiko. S-ino Root parolis esperante, slovakon tradukadis dr. Kamaryt. — Ĉeĥaj gazetoj raportas, ke S-ino Root nun ĝuas ioman ripozon en banloko Trenčanské Teplice, kie ŝi studas verkojn de Petr Chelčický, paca filozofo de 15 jc.

Nymburk. E. Klubo kunvenas unuan vendredon de ĉiu monato je la 19. h. en Dělnický dům. En la jarkunveno la 21. Aprilo estis elektita: Buka Jos. prez., Novák Rudolf sekr.; John Emil kas.; leteroj al sekr. Novák Rud. Palackého 322 aŭ prez. Buka Jos. nro 1094. Of.

Radioparolado en Praha.

La 26. Marto en kadro de la germana disaŭdigo S-ro Jos. Hajek, instruisto, parolis germane pri 40 jaroj de esperanto.

Esperanto-prediko en Praha.

Sekve de klopodoj de la Unuiĝo de katolikaj esperantistoj, okazis ree esperanta prediko de s-ro paroĥestro J. Mašek el Stupno dimanĉe la 22. IV. je la 10.30 en la preĝejo de Sta Ursulo, Národní, 8. Post la prediko diservis prezidanto de katolikaj esp-istoj, Dr. Ant. Eltschknor, ĉefepiskopa kanoniko, estis kantataj Bože před Tvou velebností, en esp. traduko de D-ro Parma kaj disdonataj sanktulaj bildoj kun esp. preĝoj. Temo de la prediko: Jesuo — bona paŝtisto. La preĝejo estis plena, la ĉeestantoj estis poste fotografitaj.

NI PREPARU LA VOJON!

Dum la tempo, kiam oni ĉie parolas pri racionalismo en laboro, estas utile pripensi ĝian signifon por nia movado. Ĉar certe per multa bona laboro oni neatingas la rezultojn, kiuj povis esti atingataj, se...

Ĉar ni scias relative tre facile atingi la rezultojn, sed tre malofte ni ilin scias utiligi. Estas certe necese pripensi la demandon, kial relative malgranda parto da vizitantoj de niaj kursoj aliĝas efektive al la movado. Hodiaŭ mi volas paroli sole pri unu parto — pri niaj plej junaj adeptoj.

La gvidanto de kurso por plenaĝuloj preskaŭ ĉiam havas eblecon rekomendi al siaj lernantoj aliĝon al la loka grupo esperantista. Tiun ĉi eblecon la gvidanto de la kurso por la junularo ne havas. Estas necese fondi apartajn rondetojn de esperantista junularo kaj aliĝi ilin al la Asocio, por vekti en nia junularo la scion, ke ĝi apartenas pere de la nacia movado — al la granda movado internacia. Sed pli frue ol estos eble utiligi specialan organizon de la junularo, estas necese ĉion bone prepari por ne fondi ion, kio ne havus longan vivon. Per decido de la nunjara Generala kunveno de CAE. estis fondita Komisiono kun la celo, aliĝi la junularon pli ol ĝis nun al nia movado (adreso de la raportanto: Jar. Novák, Praha I., Malé nám. 10). Por povi komenci tiun laboron, estas necese havigi unue statistikon de la movado inter la junularo. Por tio estas necesa kunhelpo de ĉiuj, kiuj deziras ke nia movado pli disvastiĝu inter la junularo. Tial la komisiono petas ĉiujn samideanojn, ke ili sendu al ĝi ĉiujn sciigojn pri la movado inter la junularo. Ekz.: raportojn pri partopreno en kursoj farataj kaj faritaj, adresojn de la lernantoj kiuj la lernejon vizitas aŭ vizitis k. f. p.

Nur sur bazo de tiu ĉi materialo la komisiono povas komenci sian veran laboron. Mi estas konvinkita, malgraŭ la duboj de multaj, ke tiu laboro sukcesos, ke multaj klopodos pruvi, ke ne estas pravaj tiuj, kiuj dubas. Ĉu vi volas esti ankaŭ inter ili, kara leganto?

Jaroslav Novák.

Alvoko.

La Loka Kongresa Komitato de la IV. Ĉeĥoslovaka Esp. Kongreso bezonas urĝe Esperanto-flagojn por ornamo de publikaj kaj urbaj domoj en la kongresurbo. Tial ĉiuj grupoj estas petataj pruntedoni ilin al L. K. K. kaj sendi ilin al samideano: S-ro Karl Hlawatsch-Teplice-Sanov, Nádražní 14. La forsendon bonvolu anonci al S-ro Karl Juhn, Trnovany u Teplic, Lipová ul. 10/21, kiu prizorgos la tujan resendon post la Kongreso.

Silezia Ligo Esperantista petas nin informi niajn membrojn, ke ĝi kunvenos la 5-6 Majo en Habelschwerdt kaj Woelfelsgrund en graflando Glatz, en la plej suda parto de Germanio Silezio, kaj invitas ĉs. samideanojn en la koncerna limregiono ke ili partoprenu.